




Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
Unu n-ro : 8 FF. Unujara abono kun adresaro : 40 FF.

Rekte ĝiri al pĉk-numero : 3371 74 M BORDEAUX, profite al :
Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut



KREDU AL MI

Kiam mi diras,
Ke la rido estas pli efika ol la ĝemoj,
Ke la ĉiutaga praktiko de la ĝojo
Estas la plej bona kuracilo ;
Ke la entuziasmo estas magia povo
Kiu vivigas, kiu luktas kontraŭ
La senkuraĝiĝo, la "nigrajn" ideojn,
la negativajn pensojn,
Vi povas kredi al mi,
Ĉar mi spertis tion.

Kiam mi skribas,
Ke la potenco de la volado estas
neimagebla,
Ke en ni troviĝas flamo,
Kiu, se ĝi estas regule reardigita,
Havas rimarkindan valoron en niaj
ĉiutagaj agoj ;
Ke en ni ekzistas energio simila al mil
sunoj :
Kiam tiu miriga fonto estas malkaŝita,
Nia vivo havas la kolorojn de l' ĉielarko,
Vi povas kredi al mi,
Ĉar mi spertis tion.

Kiam mi diras,
 Ke post la ĉagrenoj, suferoj, larmoj,
 Venas novaj feliĉoj, ĝojoj kaj ridoj,
 Ke ni ĉiam devas konservi la esperon
 Kiel netakseblan trezoron ;
 Ke ĉiam ni povas rekomenci, rekonstrui,
 Eĉ kiam ĉio ŝajnas neebla,
 Vi povas kredi al mi,
 Ĉar mi spertis tion...

Michèle FREUD

 L' AMIKECA RETO 1989 !

Por la ĝojo de la kleraj vojaĝantoj, aperis la ĉi-jara eldono de l' **Amikeca Reto**. Se interesas vin nur la muzeoj kaj panoramoj en iu lando vizitota, vi ne aĉetu la adresliston : en 29 landoj 184 akceptantoj, kiuj proponas multegajn nekutimajn viziteblecojn, atendas vin, ne por vin servi, sed por interkonatiĝi.

Vi ne volas viziti sunenergian domon ? Nekredeble! Nek sindikatejon, maljunulejon ? Nek kooperativ-
 ejon aŭ teatron ? Nu bone, vi ne sendu 30 FRF, eta sumo por vasta unika mondo.

Ĉu tamen vi vere ne volas havi amikojn dum via vojaĝo por skiadi, naĝi, pluki aŭ boatumi en la lando mem ? Se vi ne havas tempon por tion fari, vi ne pretendu alproksimiĝi al iu lando.

Kreaĵo de SAT, la **Amikeca Reto** celas socian kaj klerigan turismon. Tio ekzistas nur en Esperantio. Ĉu vi vivas tie ?

AMIKECA RETO, République 63, CHARGÉ,
 F 37530 AMBOISE. Tel: 4757-5563.
 Perantoj en PL, CDN, IL, BR, RA, GB, J, YU, CS.
 30 FRF al la poŝtkonto : ROLLIN Gérard,
 N° 1544 95 V. Ĝiroficejo : LA SOURCE, Francio.



RAJTO DE MALSIMILECO
 aŭ
 INTEGRADO DE LA MALPLIMULTOJ ?

J.G. enkondukas :

Okaze de la 40a datreveno de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, pluraj kolokvoj, paroladoj, prelegoj, pritraktis la temon : Ne-diskriminacio inter la homoj pro haŭto-koloro, sekso, lingvo, ktp.

Du ĉefaj vidpunktoj starigis. La unuaj defendis la rajton de malsimileco : ĉiu homo devas havi la rajton konservi siajn vivmanieron, kulturon, lingvon... interne de komun-
 umoj loka, nacia, Eŭropa... La venonta socio estos plurrasa, plurkultura.

Aliaj opinias, ke se ekzistas malsimileco, estas ankaŭ multaj similaĵoj inter la homoj el diversaj devenoj. Ekzemple, apartigante la migrantajn laboristojn en "gettojn" oni riskas ekskludon, fare de la aliaj kunvivantoj, de personoj, kiuj fine laboros kaj vivos en la sama komun-umo, kie ili devos integriĝi.

Eble estus tria vojo, se oni permesus al ĉiu homo elekti inter la diversaj kulturoj, vivmanieroj... tion, kio taŭgas por li?

Sendube oni konscias, ke multaj problemoj povos esti solvitaj nur mondscale, sed ĉu la homoj ne bezonas ankaŭ radikojn, fiksjajn gvidosignojn en tiu malkvieta mondo, kiel kantas la franca kanzonisto Maxime Le Forestier (Maksim Le Forestier en la kanzono "Né quelque part" (Naskita ie).



Suzanne :

Jes, la venonta socio estos mondskala miksaĵo el ĉiuj rasoj kaj kulturoj ; tiam, nepre la rasaj kaj kulturaj problemoj malaperos. Sed kiom da suferontoj antaŭ ol atingi tiun rezulton!

Pri nacieco, kiun oni rifuzas al iuj enmigrintoj, eĉ al tiuj naskiĝintaj en la "fremdlando", kaj tie loĝantaj, kiuj ricevis la saman edukadon kiel la landdevenaj (indigenoj), ĉu tiu cirkonstancaro ne naskas ligilojn tiel fortajn, kiel la fakto esti naskita de patrino, aŭ naskigita de patro, kiu havas la tiean naciecon ?

En la nuna socio pli kaj pli valoras nur la monhavo kaj la ekstera aspekto (vestaĵoj, ktp), kio neniigas la humanajn valorojn.

Mi aŭdis junan virinon, kiu loĝis kelkajn jarojn en ekvatora regiono. Ŝi iris al Parizo antaŭ kelkaj jaroj. Ŝi malfacile integriĝas al la urbo, nenium konaton ŝi havas, do, nenian rilaton kun la parizanoj. Tio ege mankas al ŝi, ĉar en la ekvatora regiono, kvankam ŝi loĝis en urbo el 30 000 loĝantoj, multajn kontaktojn ŝi havis kun homoj, eĉ sur la stratoj. Tie ĉi, en la metroo, ŝi havas la impreson, ke la homoj ludas komedion, t.e. ke ilia ekstera aspekto estas falsa ŝajno.

Ja radikoj necesas al la homoj, sed ĝuste la moderna evoluo neniigas la individuon. El tio... la "robotoj" sur la stratoj, kaj en la metroo.

Kristof' :

Ĉu povus ekzisti elekto inter integrado kaj malsimileco?

Ĉu la vera debato estas inter tiuj du konceptoj, tiel ke ekzistus eblecoj elekti ? Fakte mi opinias, ke la socioj jam havas ĝeneralajn leĝojn, kiuj gvidas la kondutojn de la homoj pri tiuj temoj. La evoluo al ni montras, ke individueco estas je la tagordo.

La ideo de integrado estas certe la plej maljuna el la du ideoj. Ekzemple, en Francio ĝi gvidis la 3an Respublikon en ĝiaj koloniaj entreprenoj, se ne en la faktoj, tamen en la tiuepoka ideologio. Finfine estis la daŭrigo de la revolucia ideologio : la franca ŝtato havis la impreson alporti al la tuta mondo sian potencon kaj la deklaron pri homaj rajtoj. Mi koncedas, ke tiu deklaro estis certe en tiu periodo nur

vasta ruzo, iu masko sub kiu sin kaŝis ĉiuj ekspluatado kaj perfortado.

La progreso de la socio helpis al la plivastigo de la ideologio de malsimileco : ĉiu popolo estas malsimila al la alia, ĉiu popolo devas sin mem regi; unu popolo, unu ŝtato...

Tiujn ideologiojn oni ja retrovas ĉe la bazo de la kontraŭkoloniisma movado.

Sed samtempe, oni vidas, ke la ekonomio agadas pli kaj pli mondscale : urbo, regiono aŭ ŝtato ne plu sufiĉas al la funkciado de la ekonomio, kaj kiel tereno por la interŝanĝoj. Komprenoble, jam de longe ekzistas iu internacia kampo por ekonomiaj interŝanĝoj, sed hodiaŭ ĉio iras pli kaj pli rapide.

Oni ne devus forgesi, ke la mond-ekonomio (kiel dirus F. Braudel) eltiras sian sangon el la interŝanĝoj inter la homoj sub tiu supra parto de la interŝanĝo-ekonomio. Kaj en tiu ĉiutaga vivo ekzistas longdaŭraj movoj, en kiuj ĉio ŝanĝiĝas malrapide.

Oksana :

NE NUR UTILISTOJ

La koverto, entenanta kontribuojn al malfacilega kaj tre vasta temo pri homaj rajtoj kaj integriĝado (libere elektita aŭ altrudita), falis tra la pordklapon (jen - la kultura diferenco! nun mi loĝas en Britio, kie ne estas kutimaj Eŭropaj poŝtkestoj) en tiu momento, kiam mi studis ukrainan memeldonan revuon "Katedro" (en Lviv aperas). En ĝi kaptis mian atenton artikolo de ukraina verkisto Ivan Franko titolita "Dulingveco kaj disdubiĝo de personeco". Tiu artikolo, publikigita en 1905, starigis tre gravan demandon: kio estas la gepatra lingvo? (Karaj francoj, mi havas al vi grandan peton: bonvolu diri laŭte - kio estas por vi la franca lingvo, kiun vi ĝuas ĉiutage? Por momento imagu, ke okazis ia katastrofo, kaj vi iĝis malplimulto en ŝtato, ankoraŭ nomata "Francio", ke ĉiutage oficialuloj insiste ripetas al vi, ke via lingvo ne havas "perspektivojn", ke ĝi estas "mortanta" kaj ke vi devas integriĝi, kaj se vi protestos, oni nomos vin "aĉaj francaj naciistoj", "nefinmortigitaj naciistoj", "barantoj de la tuthomara progreso"; kaj se vi venos eksterlanden, vi devos senĉese klarigadi, ke vi

estas nek germanoj nek angloj... kaj aŭdi miran : "Francio? Kie ĝi troviĝas?" ktp. Kiel vi reagas? Mi treege scivolas!

Ivan Franko diras :

"... kio estas la gepatra lingvo? Kial ĝi estas por mi pli kara ol aliaj kaj kio malhelpas min ĉe oportuna okazo ŝanĝi kontraŭ alia? Materiisto, utilisto, ne pensante ĉe minuton, diros : stulta demando! Lingvo estas interhoma komunikilo, kaj mi elektas tiun, kiu donas al mi eblecon komuniki kun plej granda kvanto da homoj. Sed samtempe iu mistera forto en homa estaĵo diras : "... vi ne havas elekton; en kiu lingvo vi naskiĝis kaj edukiĝis, tiun lingvon, sen kripligo de via animo, vi ne povas forlasi, same kiel vi ne povas interŝanĝi vian haŭton kun iu." Kaj ju pli alta, delikata, subtila estas homo, des pli malfacile li ŝanĝas sin kaj des pli terure li estas punata pro tio".

Poste l'aŭtoro faras komparon inter du geniaj ukrainoj: Taras Ŝevĉenko (la plej populara ukraina poeto) kaj N. Gogol, denaske ukraino, iĝinta klasikulo de rusa literaturo, suferinta psikajn deprimiĝojn (dum unu el tiuj deprimiĝoj li bruligis la duan volumon de "Mortaj animoj"). Sed - ni riskos eniri sferojn de du apartaj kulturoj, dum temas pri ĝenerala temo: graveco de la gepatra lingvo kaj homa rajto paroli ĝin, krei en ĝi, eduki siajn infanojn en ĝi ktp. La temo pri psikaj problemoj de homoj, kiuj libervole aŭ perforte fortranĉis siajn radikojn, estas tamen tre interesa. La ĝenerala leĝo videblas klare : konvertitoj (al alia nacio) penegas por demonstri al aliu ke ili estas "siaj", do "estas pli katolikaj ol la Papo mem". Tial inter plej fervoraj "foboj" (judofoboj, ukrainofoboj k.a.) vi nepre trovos homojn, kiuj devenas de nacioj, kiujn ili plej malŝatas kaj atakas por montri sian fidelecon al alia komunumo.

Se homoj estus nur utilistoj kaj pensus nur pri mono, multaj naciaj kulturoj simple ne plu ekzistus. Mi ne scias kiel aspektos tiu venonta socio kiam "la rasaj kaj kulturaj problemoj malaperos". Mi ne kredas ke tio ĝenerale eblas! Dum estas kulturo(j) - estas problemoj. Estingiĝos la vivo sur nia planedo - ne estos problemoj. Jes, fine de la 20a jarcento oni kutime parolas pri komuna Uson-Eŭropa **subkulturo** : ĉie oni maĉas maĉgumojn, junuloj vestas sin nigre, sur bordoj de Sejno kaj Dnipro aŭdiĝas el magnetofonoj voĉo de Madona, hamburgerojn oni jam manĝas ankaŭ en Moskvo... Kaj tamen kulturaj diferencoj restas kaj ne inten-

cas malaperi. Kaj mi ne vidas en tio malbenon, sed bonon; oni havas kion lerni unu de alia, oni havas kion interŝanĝi (ne nur : "kie hamburgeroj pli bongustas - en Hamburgo aŭ en Permo?")

La socianalizo de Suzanne (lige kun juna virino) havas trafajn priskribojn, sed... Sub la frazoj pri monavidemo aŭ "la homoj ludas komedion" ktp. volonte subskribus (se ili havus eblecon reviviĝi) niajn antaŭuloj el la 19a kaj ĉiuj antaŭaj jarcentoj! (Pensu ekzemple pri herooj de Balzac! - Mono, mono, mono...) Mi ne opinias tiujn trajtojn apartaĵo de la 20a jarcento. Kio rilatas la plendantan junan virinon, ŝia kazo, sendube, ne estas unika. Ĉiu homo suferas (depende de individuo - iuj pli, iuj malpli) translokiĝante en alian lokon, kie ne estas parencoj aŭ konatoj. Eĉ franco el Loreno aŭ franco el Marsejlo ne sentas sin tute "hejme" en Parizo, kion do diri pri homoj venintaj el aliaj landoj? Multe pli facilas se novalveninto havas en la vivo ian gravan okupon aŭ almenaŭ hobion. Esperantisto, ekzemple, scias kie serĉi aliajn esperantistojn - ĉu en Londono li estos, ĉu en Berlino, ĉu en Leningrado. En Parizo (post aŭ antaŭ trarigardo de francaj naciaj vidindaĵoj) rusa direktas sin al rusa eldonejo, librovendejo, restoracio ktp. Ukraina komunumo havas en Parizo sian bibliotekon, eldonejon, vendejon, preĝejon ktp. Same - poloj, kroatoj, judoj... Ĉiu Eŭropa metropolo havas dekojn da kulturaj centroj. Kaj se homo ne volas perdiĝi en apenaŭ konata lando, li serĉas siajn samnacionojn kaj ili helpas. En ĉiu okcident-eŭropa lando ekzistas dekoj da "diasporoj" - ne nur judaj! En tiuj diasporoj oni parolas nacilingve, tie estas kultura vivo (oni eldonas librojn kaj gazetojn, faras prelegojn, surbendigas muzikon, organizas vojaĝojn aŭ funkciigas dimanĉajn lernejojn por infanoj ktp.). Membroj de diasporoj estas dulingvaj (aŭ foje eĉ tri-lingvaj). Jes, ili parte integriĝis. Sed nur parte. Kompreneble, la tria generacio (genepoj de enmigrintoj) ofte ne plu scipovas la gepatran lingvon, kaj iliakaze eblas paroli pri kompleta integriĝo.

Mi scias, ke en nuna momento por francoj aktualas demando pri "franca ŝtataneco" (mi ne akceptas la vorton "nacieco" por "ŝtataneco" - ĉi-rilate Esperanto estas pli preciza ol la franca : cetere en E-a traduko de Universala Deklaracio de homaj rajtoj oni uzas vorton "ŝtataneco", vidu artikolon 15). Mia rimarko estas nur tia : karaj francoj,

bonvolu ne forgesi, ke ankaŭ vaskoj, bretonoj kaj okcitanoj estas indiĝenaj popoloj de la ŝtato Francio. La Deklaracio de Homaj Rajtoj rilatas ankaŭ ilin, ne nur gastlaboristojn el iamaj francaj kolonioj. La problemo (mi scias) estas tre delikata : unuj sentas sin vunditaj pro postulo peti ŝtatan-econ, aliaj ne. Mi ŝatus aŭdi ankaŭ voĉojn de gastlaboristaj infanoj!

Ankoraŭfoje pri lingvoj. Homoj, sendepende pro kiu kialo decidintaj forlasi sian patrujon, konscias ke ili havos multajn malfacilaĵojn, ke necesos adaptiĝi (certagrade) al moroj de akceptanta ŝtato. Ŝajnas al mi, ke unu kondukregulo estas por ĉiu memkomprenebla : se vi venis alian landon, bonvolu lerni ties lingvon. Tiu ĉi memkompreneblaĵo tamen ne funkcias, se temas pri rilatoj inter imperiistoj kaj koloniistoj. Ĉiuj imperiistoj (kiel prave diras Kristofo) konsideras ke ili, civilizitoj, plejprogresemluloj, venis al barbaroj, kaj ke barbaroj devas ĝoje akcepti ilian "pli superan" lingvon kaj kulturon. Feliĉe, multaj imperioj en ĉi jarcento disfalis. Restas daŭre Sovetio. Sed eĉ ĝi en nuna epoko de "glasnosto" kaj "perestrojko" havas ŝancon transformiĝi el imperio en federacian ŝtaton (ne nur surpapere, kiel tio de longe estas, sed reale!). La imperiista konduto de rusoj en ne-rusaj respublikoj de Sovetio estas pli kaj pli kritikata, kaj eĉ konsiderinda kvanto de rusoj komencas konscii pri sia ŝovinista sinteno al aliaj respublikoj, aliaj landoj de orienta Eŭropo. Antaŭnelonge la Superaj Sovetoj de Estona, Latva, Litova SSR-oj akceptis leĝojn pri ŝtata statuso de siaj lingvoj. Amasmovadoj kun sama postulo ("ŝtatan statuson al la gepatra lingvo!") fortas nun en Ukraina SSR, Belarusa SSR, Moldava SSR k.a. Do - ploru la utilistoj! - la plimulto da homoj estas gvidataj ne de tuja utilo, praktika eblo komuniki kun kiel eble plej granda kvanto da homoj, sed per tiu "mistera forto", nomata "la gepatra lingvo", pri kiu komence de l' jarcento parolis I. Franko. Se estas multaj suferantoj, kiel prave rimarkas Suzanne, ili estas ne pro kultura diverseco, sed pro la ŝovinista sinteno ĉe multaj anoj de t.n. "grandaj nacioj", kiuj ĝis nun ne komprenis, ke ne ekzistas "grandaj kaj malgrandaj nacioj", ke "granda cirklo ne estas pli perfekta ol malgranda cirklo".

Esperanto estas natura aliancano de malpli disvastigitaj naciaj lingvoj (pensu ekzemple pri E-movado en Hungario aŭ baltaj landoj). Jes, ni iru al pli vasta komuna homara

posedaĵo (ne nur : Hugo, Ŝekspir, Puŝkin... - sed multe pli longa listo de nomoj, kiuj estu konataj al ĉiu!) - ne tra morto kaj perforta pereigo de "malgrandaj" nacioj, sed tra disfloro de ĉiuj en etoso de reciproka estimo kaj kunlaboro.

deziranta nek franciĝi nek angliĝi
Malutiliste kaj esperantiste
Oksana

GAROLO :

PLIAJ MISTIFIKAĴOJ

Kvankam mi jam laciĝis legi kaj skribi pri la "Homaj Rajtoj", por ne esti malsimila kaj por sekvi la modismon de la plimulto mi ree parolos pri la mistifikaĵoj!

Unue, malsimileco en la naturo, ĉe la homoj, en la socio, en la raso, en religioj, ktp, ne estas afero de "rajto" aŭ "nerajto". Malsimileco ekzistas universale... Sed mi mem, en SAT, pro la simpla fakto, ke mi esprimis tiun fakton, ekzemple rilate al raso, pro la simpla fakto ke mi skribis (kaj pruveble ripetas) ke ekzistas rasdiferencoj (ras-malsimileco havas similan signifon), laŭ la ĝeneralaj "tezoj" de SAT, mi estis kondamnita kiel "rasisto"... Kaj, jes, tio okazas laŭ la ridinda leĝo de la plimulto, kiu dekretis, ke esprimo de ekzisto de rasdiferencoj estas rasismo!

Kiel mi jam havis la oportunon tion ofte skribi, inkluzive en mia libro "**Moderna Mito : la Kolektiveco**", la homoj, ni ĉiuj senescepte, sin lasis kapti de la mito Kolektiveco ; ni ne plu memstare, individue, pensas kaj agas, sed iĝis instrumento de la Kolektiveco, de la sistemoj de la ŝtatoj. Ni eĉ konfuzas la nociojn pri "devoj" kaj "rajtoj" kaj, jes, tro facile submetiĝas al la mistifikado de la plimulto.

La moda depostulo de "rajtoj" estas nura reago de la individuoj kontraŭ la sistemoj de la plimulto. Kaj, finfine, vidu la absurdon : mi demandas, kiu limigas kaj kontraŭstaras niajn "rajtojn" ? Kiu mortigas homojn, kiu atencas nian vivmanieron, nian kulturon, kiu ne lasas la homojn libere agi kaj labori, kiu ne permesas nian laŭvolan cirkuladon, kiu influas nian penson kaj ne lasas

sencenzuran esprimon de tiuj pensoj, kiu kreis la prizonajn koncentrejojn, kiu establis la homleĝojn, la landlimojn, la ŝtatlimojn, la pasportojn, la impostojn, la stampojn kaj ĉiujn dispoziciojn, kiuj limigas nian liberan evoluon kaj forprenas niajn "homajn rajtojn"? La respondo, paradokse, estas simplega. Kiuj forprenas, nuligas niajn homajn rajtojn estas ni mem, la homoj. Estas ni mem, kiam ĝuste por defendi niajn rajtojn, ni establas sistemojn, kaj nin fermas en neelirebla cirklo. Aŭ ĉu ne estas ni - la homoj - en tiu fama plimulto, kiuj kreis, ekzemple, la ŝtatojn kaj kiuj plejmulte opinias, ke la ŝtatoj estas nepre bezonaj, necesaj por la funkcio de la sociordo? Do, kia hipokrita sinteno estas tio? Ĉu ni ne plu kapablas ĉesigi nian memmistifikadon?

Bedaŭrinde, laŭ ridindaj homaj principoj, la plimulto ĉiam pravas! Kaj, jes, la malsimiluloj, la nekonformismuloj, la objetantoj, la memstaruloj devas submetiĝi al tiu plimulto... aŭ pereji en la sistemoj mem.

Jakelino :

VIVU LA DIVERSECO !

Mi opinias, ke la diverseco de homoj estas riĉeco por la tuta homaro. Tial mi estas malamiko de sennaciismo tia, kia ĝin difinas PIV. La ideo, ke devus malaperi ĉiuj kulturlingvoj minus unu simple plenigas mian menson per forta sento de hororo, kiel senkompara barbaraĵo.

Pro tio ankaŭ mi havis problemojn en SAT : ĉar mi konsentas, ke strasburganoj parolu alzace, formiĝis legendo, laŭ kiu mi estas "alzaca etnaciisto". Ĉar mi ne vidas la tutan mondon el vidpunkto pariza, mi akiris reputacion de provinculino. Demando : ĉu povas ekzisti pariza etnismo ?

Tamen, mi ne konsentas kun Garolo. Laŭ mi, la kulturo ne dependas de la raso. Se nigrhaŭta aŭ flavhaŭta infano estas adoptita de franca familio, ĝi fariĝas franco. Pro la manko de adopteblaj infanoj en Francio, plimultiĝas tiaj adoptoj, do la rezulton oni povas konstati.

Tamen la aparteno al etno, kvankam sendependa de la raso, ne dependas de la volo de individuo, ĉar ĝi komenciĝas antaŭ ol oni havas konscion pri si mem. Mi ne elektis la unuan lingvon, kiun mi aŭdis, la nutraĵojn, kiujn mi man-



Hipokrito

En januaro reprezentantoj de 147 nacioj kunvenis en Parizo por malpermesi la fabrikadon kaj stokadon de kemiaj armiloj, kies uzado estis jam oficiale malpermesita. Bone! Sed la iniciatintoj de tiu konferenco estas ĝuste tiuj (inter ili Francio), kiuj posedas grandegajn stokojn de nukleaj armiloj, el kiuj ĉiu sufiĉus por forstreki el la mapo grandegan urbon kun vasta ĉirkaŭa regiono. Ĉu tio ne rememorigas la parabolon pri la lignereto, kiun oni vidas en fremda okulo kaj la trabo, kiun oni ne vidas en sia?

Cetere, kemiaj kaj nukleaj armiloj estas ja abomenindaj aferoj, sed se oni prave malpermesos ilin, kial ne malpermesi ankaŭ la t.n. "konvenciajn", t.e. tradiciajn, kutime uzatajn armilojn ? Ĉu tiuj ne sufiĉis por en unu tago aŭ nokto mortigi en Dreseno aŭ en Hamburgo tiom da senkulpaj viktimoj, kiom la atombombo en Hiroŝima ?

En 1934, por protesti kontraŭ enkarcerigon de militarifuzanto, mi sendis al la tiam ministro Daladier poŝtkarton, sur kiu estis presita frazo pri "aerkemia milito". Kaj mi manskribe aldonis : "Ĉu 'aerkemia', ĉu ne, milito estas milito, kaj ja en sia principo ĝi estas kondamninda." Tio kaŭzis al mi perdon de miaj oficiraj galonoj - negrava perdo!) Kaj mi konservas tiun opinion : kio estas kondamninda, tio ne estas unu aŭ alia formo de amasbuĉado, sed la principo mem de milito. Post la unua mondmilito, la franca politikisto Aristide Briand provis iniciati, ke ĉiuj nacioj proklamu la militon "eksterleĝa". Kompreneble, sensukcese; kaj la dua mondmilito estis eĉ pli terura ol la unua. Ĉu ni iru al la tria, kun aŭ sen kemiaj armiloj?

Ardaj kredantoj

En la Mezepoko, kaj, en kelkaj landoj, ankoraŭ longe plu, la Inkvizicio bruligadis herezulojn kaj "sorĉistojn".

En la XVI-a jarcento en Ĝenevo, Kalvino bruligis Mikaelon Servet pro lia malkonsento pri la Triunuo.

Antaŭ nelonge en Parizo "integristaj" katolikoj bruligis kinejon pro filmo, kiu ŝokis ilian kredon.

Pli freŝdate en Islamabado "integristaj" islamanoj bruligis bibliotekon pro libro, kiu same ŝokis ilian kredon.

(En tiuj ĉi du lastaj okazoj, kelkaj senkulpaj homoj estis mortigitaj).

Ĉio ĉi en la nomo de Dio, kiun Liaj kredantoj nomas "kompatema kaj bonkora".

Kaj iuj volus, ke pro toleremo ni ne kontraŭbatalu tiujn krimajn frenezulojn !

Certe ĉiu kredo, kiel ĉiu penso aŭ opinio, estas respektinda, kaj devas esti libera. Sed ne la krimoj, kiujn ĝi iafaje okazigas.

La Inkvizicio nomis siajn bruligojn aŭtodafeoj, t.e. laŭvorte "agoj de kredo". Ankaŭ la ekzekutoj ordonitaj de Kalvino en Ĝenevo, la leĝaj ekzekutoj de Giordano Bruno, de Kavaliro de la Barre kaj de multaj aliaj, kaj la anonimaj bruligoj en Parizo kaj en Islamabado estis agoj de kredo. Ĉu tial ili ne estus kondamnindaj ? Ĉu la religia fanatikeco, kiam ĝi perforte agas, estas pli akceptebla, tial ke ĝi estas religia, ol kiu ajn alia perforto ?

Sekvo (kaj ho ve! ne fino)

Aperis libro inspirita de Satano, kiun la veraj islamanoj malbenas. Unue oni bruligis la libron, tuj poste oni kondamnis al morto la aŭtoron, kiu, feliĉe, vivas en relativa sekureco en Britio. "Oni", kiu ? Nome la estro de la Irana popolo, kiu estas granda, jam longe civilizita kaj kulturita popolo, Lia Imana Moŝto Ĥomejni. Tiu blankbarba frenezulo, kies kaduka voĉo frenezigas fanatikajn popolamasojn, ordonis al ĉiu islamano mortigi la blasfeman verkiston.

En Okcidento tiu voko al murdo provokis unuaniman indignon. Ŝajnas tamen, ke la reago de la oficialaj instancoj estas iomete mola kaj embarasita. Mi diris, ke la Irana popolo estas civilizita, kun longe polurita kulturo. Irano estas ankaŭ interesa merkato por la okcidenta komerco :

niaj registoj kaj diplomatoj devas ĝin domaĝi, ĉu ne ?

Kaj niaj spiritaj eminentuloj ? Monsinjoro Decourtray, arkiepiskopo de Liono, primaso de Gallio, firme deklaris : "Kondamni iun al morto pro libro estas simple abomeninde", kaj : "religio, kia ajn ĝi estas, estas kondamninda, kiam ĝi falas en malracian fanatikon". Bone. Sed la morgaŭon li aldonis : "Ankoraŭfoje la kredantoj estas ofenditaj en sia kredo. Hieraŭ la kristanoj per filmo misfiguranta la vizaĝon de Kristo. Hodiaŭ la muzulmanoj per libro pri la Profeto. Apud fanatikaj reagoj, kiuj estas ankaŭ ofendoj al Dio, mi esprimas mian solidaron al ĉiuj, kiuj vivas tiun vundon en digno kaj preĝo."

Do, li malaprobas la vokon al murdo, sed li komprenas kaj aprobas la indignon kaj la koleron de la murdopretaj frenezuloj.

Sed, Sinjoroj Inkviziciistoj, kiu devigas vin spekti la malbenitan filmon, kiun cetere vi ne vidis, aŭ legi la malbenitan libron, kiun vi ne legis ? Vi estas liberaj ignori ilin.

Sed kion signifas por Torkemada kaj Ĥomejni la vorto libero ?

Iu prave diris : kiam oni komencas per bruligo de libroj, oni ne scias, ĝis kiu ekstremo estos pelata la maltoleremo. Almenaŭ en okcidento, ni esperis esti definitive liberigitaj de tia danĝero de post la malapero de Hitler kaj tiu de Stalin kaj de Franko. Sed la maltoleremo, kiam oni kredas ĝin mortinta, denove relevas la kapon. Kiel en la tempo de Volter, Diderot kc., la batalo por penslibero estas ĉiam aktuala. Tion mi jam plurfoje diris, tion mi ripetados, tiel longe kiel necese. Sed mi malaperos pli frue ol la fanatikismo.

114 jaroj

En februaro la plej aĝa el la francoj, eble eĉ el la homoj, celebris en Arlezo la 114an datrevenon de sia naskiĝo. Laŭ la gazetoj ŝi estas ankoraŭ sana kaj vigla, kaj ŝi invitis la ĵurnalistojn al nova renkonto post unu plia jaro.

En 1904, mia arleza avino estis ankoraŭ juna, 50-jara; ŝi havis sian patrinon kaj sian avinon, kiuj kune vivis en

Taraskono. Iam ni vizitis ilin. Ili estis malaltaj, maldikaj, blankharaj kaj tre viglaj. Mi bone memoras pri iliaj faltitaj vizaĝoj, iliaj tre vivaj okuloj, iliaj mildaj sed firmaj voĉoj sonantaj en la belsona provenca lingvo. Ili tre ĝojis pri la kvarjara pranepeto, kiu mi estis, kaj ili vete dorlotis min. Neniam mi revidis ilin, sed tiu tago en Taraskono restis profunde gravurita en mia memoro.

Ĉu do la rodanprovenca aero estas favora al konservo de centjaruloj? Tiajn mi tamen ne konas en mia familio. Eĉ tiuj du maljunaj praavinoj ne atingis la centan jaron. Mia arleza avo mortis 90-jara. Tia mi estos, se mi ĝisvivos la venontan jaron. Mi ne deziras pli, kvankam ĉiu nova tago alportas al mi interesajn novaĵojn. Kion vidos, konos kaj spertos mia pranepeto Francisko? - se nur, en la venonta jarcento, la homaro ne sin detruos per siaj stultaĵoj...

Elasteco de la vortoj Respubliko kaj Respublikanoj

En la lasta baloto por la parlamento de okcidenta Berlino estis elektitaj dek deputitoj el la Respublika Partio, kio estas rimarkinda sukceso. Kiu estas tiu partio? Nu, ĝi konsistas el novnazioj, nostalgiaj pri la granda III-a Reich de Hitler.

En Francio, la partio de Chirac estas nomita "Unuiĝo por la Respubliko", kaj tiu de Giscard d'Estaing "Respublikana Partio". Eĉ Le Pen estas "respublikano" kaj "demokrato".

En Usono, la pli reakcia el la du grandaj politikaj partioj estas la Respublikana Partio de Reagan kaj Bush.

Stalin estis estro de la Unio de Socialistaj Sovetaj Respublikoj. Multajn aliajn ekzemplojn oni trovas en la nuna mondo. Kiel multaj estas la "respublikoj" kaj la "respublikanoj"! Ankaŭ en la historio: Bonaparto certe estis respublikano de 1792 ĝis 1797. Post 1804 li stampigis ormonerojn kun la devizo: "Franca Respubliko - Napoleono imperiestro". Imite al la Romio de la Cezaroj, ŝajne ne estis kontraŭdiro inter la du vortoj Respubliko kaj Imperio.

Kaj ĉu la diktatoro Hitler ne diris sin "nacia socialisto"?

Respubliko, Socialismo, Komunismo, Libereco, ktp., jen estas elastaj vortoj, plursignifaj laŭ la loko kaj tempo, kaj fine sensignifaj. Kiel multaj aliaj vortoj. Vortoj estas elastaj ujoj, en kiujn ĉiu metas, kion li volas. Malfidu tiujn ujojn, kaj serĉu pri ilia vera enhavo.

KOMPUTEROJ KAJ ESPERANTO

Multaj inter niaj samideanoj posedas nun komputeron. Inter la multaj eblaj uzoj estas tekstoprilaborado, kaj ĵus aperis programoj pri perkomputera publikigado. Kion signifas tio?

Tekstoprilaborado estas uzo de komputero kiel skribmaŝino, sed kun kroma ebleco korekti la erarojn, aldoni, kopii aŭ forigi paragrafon, ĝustigi liniojn (t.e. fari tiel, ke la fino de ĉiu teksta linio estu sur la sama rekta linio) kaj nun la plej modernaj kontrolas eĉ ortografion. Iuj el ili povas mastrumi la ĉapitrojn, numeri aŭtomate la paĝojn kaj la paragrafojn, krei la liston de la enhavo, ktp.

Perkomputera publikigado estas alia afero. Ĝi uzas tekston jam prilaboritan kaj ebligas disloki la tekstojn kaj bildojn kiel en gazeto. Per tiuj programoj oni rajtas ŝanĝi la grandecon de la literoj, la stilon de la alfabeto (klasika, moderna, skribmaŝina kaj eĉ gotika). Oni povas distranĉi parton de bildo, pli- aŭ malpli-grandigi ĝin, ktp.


Tiuj sistemoj ebligas al unuopuloj eldoni mem gazeton aŭ broŝuron. Tio multe plaĉas al esperantistoj, kiuj estas, almenaŭ en Francio, ĝismedolaj individuistoj, kaj baldaŭ ili provas skribi esperantan tekston pere de tia sistemo. Neeviteble, ili renkontas la problemon pri ĉapelitaj literoj.

Multaj scias, ke la problemo estas facile solvebla, sed malmultaj scias kiel. Ĝenerale, post kelkaj vesperoj antaŭ la komputero, - je la pleja bedaŭro de la geedzo - ili sukcesas ellabori solveton kaj triumfe ekvidas ĉapelitan "c" aŭ "s" aperi sur la ekrano aŭ la papero.

Sed mallonge daŭras la sukceso, ĉar li baldaŭ konstatas, ke lia aranĝo funkcias nur en limigitaj kondiĉoj, kaj ke la laboro estas refarenda okaze de ĉiu ŝanĝo en la komputera sistemo.

Por kompreni tion, mi provos klarigi tion okazantan en la klavaro, en la ekrano, en la komputero kaj en la presilo.

Unue la klavaro. Estas la plej simpla. Oni frapas "kejon", kaj ĝi sendas unu aŭ plurajn kodojn al la komputero. Ekzemple, mi tajpas "a" kaj la klavaro sendas "97" al la komputero. Iuj kejoj estas "mortaj kejoj", kio signifas ke




la montrilo ne moviĝas, kiam oni frapas ilin. En IUJ komputeroj (kaj nur en iuj) oni povas tiel frapi cirkumfleksojn, kiel en la franca MINITEL... Sed nur por kelkaj literoj, ĉar la MINITEL tradukas tuj la du kodojn en unu, post kontrolo, ke la litero estas permesita.

Due, en la memoro de la komputero. La literoj estas reprezentataj per unu aŭ pluraj kodoj. Ekzemple, "a" povas uzi tri kodojn: unu por la akcento kaj inter ili unu nomita BACKSPACE, kio signifas, ke la du signoj estas je la sama loko. En tiu kazo, oni povas verŝajne anstataŭigi "a" per "s",


* unu por "a",...

kaj tiel fari esperantan literon. Male, se estas nur UNU speciala kodo por "a", tio signifas, ke ĝi estas antaŭvidita, kiel por ĉiuj literoj de la ĉefaj eŭropaj lingvoj. Sed bedaŭrinde ne por esperantaj. Tiukaze ne eblos rekte tajpi "ŝ".



la litero estas konstruita per etaj punktoj

Nun la ekrano. Sur ĝi, la literoj estas farataj el etaj punktoj. Specialaj cirkvitoj tradukas la kodojn en aranĝon de punktoj. Notu, ke malsame kiel ĉe skribmaŝino, la literoj ne aperas aŭtomate, kiam oni frapas kejon. La aranĝo por la akcentitaj literoj devas esti jam preta en la memoro.



PRESILO

la literoj povas esti tajpitaj aŭ konstruitaj per punktoj (sed ne estas nepre la sama desegno kiel por la ekrano).

Fine, la presilo. Estas pluraj specoj de presiloj: kun petalrado, kun nadloj aŭ lasera. La petalrada presilo havas radon kun petaloj kaj sur ĉiu petalo estas litero (*). Al tia presilo oni devas sendi la kodon BACKSPACE kun la akcento por presigi ĉapelitan literon. Se oni deziras alian alfabeton, oni ŝanĝu la petalradon.

La nadla presilo uzas aron da kelkaj nadloj (nadlo estas ia kudrilo) por balai la paperon. Ĉiu nadlo presas aŭ ne punkton, kaj la aranĝo de la presitaj punktoj

faras la literojn. Tiu sistemo estas pli fleksebla ol la unua, ĉar la cirkvitoj de la presilo ebligas plurajn literstilojn.

La lasera presilo uzas laseron por ĵeti inkon sur la paperon. Ĝi estas tre preciza kaj tre rapida, kaj per ĝi oni obtenas belegajn literojn, similajn al tiuj de eldonista presmaŝino. La kontrolo de tiuj maŝinoj estas ĝenerale malsimpla, do oni devas uzi programon (kies enhavo estas plej ofte nekonata) por funkciigi ilin.

Feliĉe, oni povas, en iuj materialoj, difini mem la literojn. Tio signifas, ke oni povas ordoni al la komputero aperigi la dolarsignon kiel "ŝ", la kajsignon kiel "ĝ", ktp. Oni povas eĉ uzi neuzitajn kodojn por tio. Sed la ekrano tute

sendependas de la presilo, kaj oni devas fari aranĝon por ambaŭ aparatoj.

Do, kiu volas esperantigi sian komputeron, tiu devas zorgi pri jeno :

- Elekti kiujn kejojn li devos frapi por obteni la ĉapelitajn literojn.

- Elekti kodo(j)n por reprezenti ilin en la memoro (ekzemple la kodojn de la anstataŭitaj signoj).

- Elturniĝi, por ke la literoj bele aperu sur la ekrano aŭ decidi, ke ne gravas, se "ŝ" aperos kiel "\$", "ĝ" kiel "&", ktp.

- Trovi solvon por aperigi la literojn sur la paperon :

1) aŭ uzi BACKSPACE. Tiu solvo malavantaĝas pro tio, ke iuj aferoj foje ne plu eblas : ĝustigi la linion aŭ presi invers-kolore (t.e. blanke en nigra rektangulo). Krome, pri la majuskloj, la rezulto estas malbela, eĉ nelegebla.

2) aŭ uzi literojn redifinitajn de vi mem. Tiu solvo devigas vin fari tion por ĈIUJ alfabetoj, kiujn vi deziras uzi.

Plie, ankaŭ ĉiuj programoj devas esti adaptitaj. Se oni uzas tekstoprilaboradon kaj perkomputeran publikigadon, oni devas kontroli, ke la solvo elektita kongruas al ambaŭ programoj. Se ne, oni devas skribi tradukprogramon por ŝanĝi la tekston - aŭ fari tion mane, kio estas pli teda.

Iuj sistemoj solvas la problemon pli facile ol aliaj. Tiuj ĉi estas kompreneble pli multekostaj. Sed ne imagu, ke aĉeti multekostan sistemon sufiĉos. Ĉar vi ofte falos en alian kaptilon : facilas solvi vian problemon sed mankas io (programo, memoro, cirkvito aŭ alia afero) ĝenerale multe kosta, kiun vi devos aĉeti por (eble) uzi tiun solvon.

Male, se vi elektas malmultekostan sistemon, antaŭvidu kelkajn dekhorojn por ĉion aranĝi, se eblos tion fari.

Mi ne parolu pri la surprizo, kiun renkontos esperantistoj, kiam ili provos komunikigi siajn komputerojn pere de telefona reto : la arbitraj solvoj elektitaj de ĉiuj individue, verŝajnege ne akordigeblos.

Tial, por eviti tiajn malfacilaĵojn al niaj samideanoj, mi proponas ke, kiam ne ĉio iras glate, oni uzu KOMUNAN rimedon. Por instigi ilin, mi favorus aldoni regulon al nia lingvo :

"Supersignojn EBLAS anstataŭigi per apostrofo"

Tiuj kvin vortoj ŝanĝos nenion de la pasinteco : neniu libro, nek vortaro estos ŝanĝenda, eĉ pri komo. Nenion ili ŝanĝos pri la prezento : iuj jam uzas ĝin. Sed multe ili helpos en la estonteco...

(*) Mi legis en **MONATO**, ke D-ro Zamenhof estus deponinta patenton por iu skribmaŝino funkcia laŭ la sama principo...

ĴANSEB.

Danièle H. :

KIUJ ESTAS LA INFORMADIKISTOJ ?

Fariĝinte la "reĝoj", post la instruista kaj kuracista erao, ili havis ŝajne senlimajn mondon kaj povon. Elemento ne malhavebla por la entrepreno, ili tenas ĉiujn informojn necesajn por ties administrado kaj spionas la deĵorprogramon de la salajruloj. Ĉioreĝantaj ili estis.

Ilia potenco, de tiam, falis.

El sia antaŭa potenco, la informadikisto ofte plu konservas (malpli inter la novvenintoj, ĉar feliĉe, la sanktega informadiko demokratiĝas kaj vulgariĝas, dank'al la lerneja kaj kluba instruado) malgrandanimecon; li emas al individuismo, konkurado, tretante sian kolegon por sin montri, por pli rapide supreniĝi, tenante ĉiujn siajn persperte akiritajn receptojn cele al nur sia profito.

La allogo de mono daŭre viglas en la ĉiunivela informadikisto, kiu ree ŝanĝos dungejon por pli rapide grimpi, statute, sed ĉefe salajre. La pagoj multe malegalas inter du societoj, kaj la informadikisto abonos priinformadikajn revuojn ("Le Monde informatique"...), por pli trafe celi sian predon. La salajroj, por iu sama laboro, varias de unuo al duoblo en iu sama regiono. Se la informadikisto troviĝas barata pro iu ajn kialo : hierarkio, strukturo de la societo..., li serĉos ion pli bonan alie; neniam li satas, kaj lia voremo por mono senlimas : nenium rimedon li timas uzi por ĉiam pli atingi.

Unu rilate la alian, informadikistoj ofte estas malamikaj fratoj. La konversacitemoj, kiuj ilin kunigas, estas la Borso, la privatigoj, la laŭmodaj sportoj (golfo, velumado), la laŭmodaj aŭtomobiloj (t.n. GTI), la ŝikaj kvartaloj, kie ili loĝas, iliaj ferilokoj : lukso paradanta. Oni montru, antaŭ ĉio, ke oni ne spertajn monajn limojn, ke oni sukcesis, ĉar oni vivas en maksimuma lukso; kaj se aliuloj ne tiom bonŝancis, tio devenas, ke ili estas neelturnigemaj "merduloj", ke ili ricevis nur kion ili meritas, kaj ke necesas ŝtopi la orelojn pri iliaj plendoj, priridi iliajn malfeliĉojn, kaj krome, anstataŭ justigo, kiom eble plej elmontradi.

Nur la informadikistoj venintaj pro readaptiĝo : ministoj, ŝtallaboristoj..., post la kvardekjariĝo, fremdas de tiu mensa sinteno : ili plu havas tiun de sia klaso antaŭ la readaptiĝo, kun jenaj valoroj : solidareco kaj ĉelabora kunhelpo, ordinaraj, ĉiutagvivaj temoj por diskuti, sen pseŭda honto kaj sen troaj rakontaĵoj.

La tute juna generacio priesploras sin. Malplialtemas la salajroj, abundas la informadikistoj, senlaboras iuj (7 %); la bezono stabiliĝis, la gejunuloj trovas la samajn problemojn, kiel la ceteraj, kaj ne tiom "kaidumas" kiom la 5-10 jarojn pliaĝaj, antaŭ ili enirintaj la labormerkaton.

Jen, proksimume, kiuj ni estas, ni informadikistoj, laŭ niaj aĝo, deveno kaj ambicioj.

Tri kategorioj :

- la pliaĝaj, readaptiĝintaj kaj solidaraj;
- la tute junaj, kiuj pli-malpli penis por trovi laboron, malpli alte pagataj ol ili esperis, kaj same sin demandantaj, kiel la cetera junularo;
- kaj la meza tavolo, kiu daŭre kredas sin "elirinta el la femuro de Jupitero"...

Tradukis : M.T.L.

- Ĉu en komputera lando Japanio estas anakronisma komedio ?!

"La morto de la plej respektita aĉaĵo
HIROHITO"

... tamen ĉu tro kraĉe klaĉeme ?

En la PIV ne troviĝas vorto "tenno" malgraŭ ke ĝi estas en mia Esp.-Jap. vortaro (verkita de Ŝihei MIJAKE). Ĝis la fino de la 2a mondmilito "tenno" signifis "monarko de japana imperio", nome ekzakte "imperiestro" laŭ la tiama konstitucio. Sekve ĝi estis homo aŭ dia homo, eĉ se por iuj li estis aĉulo aŭ diktatoro. Sed hodiaŭ "tenno" ne ekzakte signifas "imperiestro", ĉar laŭ la nuna konstitucio ĝi oficiale ne havas politikan potencon. "Ĝi" estas simbolo de kunigo (?) (aŭ aneksado! aŭ sintezo!) de Japanio, nome ĝi neniam devas esti aĉulo sed por iuj certe ĝi estas aĉaĵo !

Fi-komedio : artefarita morto.

Kial ĝi (HIROHITO) mortis ? (kvankam jam nova tenno reaperis...), ĉar ĝi estas aĵo, tamen ĝi mem havis hazarde homan organizon (?!). Sed ĝi estus devinta morti pli frue, se homo ĝi vere estus estinta. Sed Hirohito ĝis la morto, feliĉe aŭ malfeliĉe, ne estis homo -!! Jam ekde ĉirkaŭ 1 jaro la plej malaltnivela kuracisto-grupo de Japanio traktis ĝin - estis ilia tasko - ĝis la 7a de feliĉa novjaro '89 por nur daŭrigi korbataĉon. Ili sciis ke ĝi-Hirohito ne plu resaniĝos. Sed ili ne rajtis trankvile forlasi ĝin, eĉ se ĝi ne plu estis kuracebla = riparebla. Kaj ankaŭ tenno-Hirohito eĉ ne rajtis diri "mi ne plu volas vivi" kaj kompreneble nek "mi volas morti". - (Homo ja rajtas almenaŭ diri tion, eĉ se morale ĉiam oni devus havi esperon...) - Ĉar "mi" signifas "tenno", rezulte la frazo "Tenno ne plu volas vivi" estas ja tabua diraĵo por simbolo de Japanio.

Lia korpo pezis jam malpli ol 35 kg-ojn, nome ĝi konsistis eble nur el ostoj kaj haŭto... Estas bela simbolo, ĉu ne ! Jam el la sankta sango (*1) neniom plu restis en lia korpo pro multege da transfuzoj de "homo-sango". Li ne plu povis nutri sin per buŝo, jam de longa tempo... ... Ne! ne ekzakte. Fakte, la kuracistaro ne akceptis lian manĝadon per buŝo. Li havis fiksitajn ĉiam iom da febro. Tiu de natura homo normale altiĝas aŭ malaltiĝas de tiu eta febro, sed ne restas je tiu febra nivelo. Tiu temperaturo estis absolute artefarita per daŭra uzo de medika-

mentoj, nome antibiotikoj. Tenno ne rajtas elekti ekster-okcidentan kuracmanieron, ekzemple akupunkturaron ktp. nek homeopation aŭ okcidentan neortodoksan kuracmetodon.

Ĉar tenno ne nur signifas HIROHITO, sed evidente ĝi estas nomo de la sistemo (aŭ reĝimo). En la tenno-sistemo nur moderna okcidenta medicino estas akceptata.

Estis ja mizera Hirohito. Ĝi estis respektata nur tiam, kiam ĝi intence aŭ neintence povis daŭrigi sian korbataĵon eĉ sen lia karno (!), sed ne tiam, kiam li volis morti nek kiam li volis vivi (!) aŭ manĝi laŭ sia deziro, nek kiam li ne bone (= ruze) kaŝis sian opinion. Ĝi estis ja mizera.

Sed ĝi elektis tion. Reale laŭ la naturo li ja havis rajton rifuzi kiel homo. Tial tio devus esti fine daŭrkorbatiga puno. Ĝi ja devis esti mizera!

Kiam Hirohito estis (iel ajn!?) homo=imperiestro, pro lia nomo, kiom da homoj iris al batalfronto? Se ankoraŭ temus nur pri homoj, kiuj kredis je li, tio estus apenaŭ akceptebla laŭ iliaj honestecoj. Sed laŭ lia nomo nome Tenno-armeo, kiom da homoj estis mortigitaj aŭ masakritaj kiel en NANKIN (Ĉinio), en sudorienta Azio aŭ en Okinaŭa (Rjukiŭ-insularo) aŭ eĉ en Japanio, ktp. Por ĉio li kulpas.

Li ne estis kondamnita al morto kiel aliaj militkrimuloj. Mi persone absolute kontraŭas al la mortopuno (*2). Sed mi opinias, ke tenno-Hirohito mem devis almenaŭ manifesti rifuzon de tiu nova posteno kaj pardonpetegi al ĉiuj, sed kompreneble ne ĉefe al japanoj pro siaj krimoj kaj kulpoj. Sed li ĝis la morto kaŝis sin uzante nudveran maskon, nome "Hirohito = simbolo = ĝi".

Tamen Hirohito fine eĉ diris "mi ne volas kritiki tiutempajn militistaro-vidantojn" (1975) (*3).

Ĝi neniam faras krimon, ĉar ĝi ne estas homo, nur homo faras krimon (... sed ĝi povas fari aĉaĵon!)

Kaj kompreneble logike neniu kapablas mortigi aŭ vundi ĝin... ĉar ĝi ne estas homo...! (nek estas homa -!)

Sed, se oni volas "rompi" aŭ "detru" ĝin, tiam oni ricevas la plej pezan punon el ĉiuj punoj de Japanio, nome kiel "ŝtatperfida krimo" aŭ kiel "majestecinsulta krimo" kvazaŭ antaŭ la 2-a mondmilito, tamen tio estis malkaŝe pruvita okaze de la juĝo (nov. 1979) kontraŭ la teroristgrupo "Orientazia-kontraŭjapanio-Armita-Fronto", kiu volis mortigi (= detru) Hirohiton. (La tenno-sistemo kondamnis al

morto 2 personojn, al dumviva puno 1 personon kaj al 18-jara puno, kaj eĉ nemembron al 8-jara puno kiel pro "mensa senforma helpada krimo" ?!) Malgraŭ ke tenno neniam mortas!! Ĉar morto de Hirohito ne signifas morton de la tenno.

Kiam ĝi finiĝis, tuj nova tenno-Akihito aperis. Freŝigita tenno : kial oni devas malgaji pro malapero de malnova sulkoplana tenno? Neniam necesas tia konfuzo.

Fi-komedio : artefarita malgajo.

Pro la malgajo neniu plu rigardis eĉ televidon...? Ne! Sub la registaro ĉiuj televidoelsendejoj ĉesigis ordinaran programon dum 6 tagoj : nome ili elsendis nur ĝeneralajn novaĵojn kaj specialan programon pri la vivo de tenno Hirohito. Kaj sekve kelkiloj da homoj telefonis proteste al elsendejoj por ke ili elsendu normalajn programojn.

Multe da homoj iris al videoluejoj pro tio. Sed pornografiaj videofilmoj estis malpermesataj... kaj kial estis permesataj "komedioj de Ĉaplin aŭ Marks-fratoj"?? Kaj policistoj plilongigis la vicon al imperia palaco por mirigi popolon aŭ eksterlandanojn pro la longeco.

Kaj eksterlandaj ĵurnalistoj montras sian miron. Sed nesciinte aŭ eĉ sciinte, ili neniam intervjuas koreojn, ainojn aŭ okinaŭojn (= Rjukiŭanojn), kiuj loĝas ankaŭ en "hodiaŭa Japanio", sed neniam kiel japanoj! - Antaŭ 2 jaroj Hirohito volis iri (por vidi senpage sportoludojn) al Okinaŭa (en Rjukiŭ-insularo), insulo en kiu multege da civitanoj mortis dum la lasta mondmilito. Ĉar la imperia armeo (nome tenno-armeo) ordonis al Okinaŭa-loĝantoj neniam kapitulaci, se ili ne plu povas batali kontraŭ la usona armeo, ili memmortigu aŭ mortigu unu la alian perfekte kiel japanoj (!!)... Sed fakte tio estis por gajni tempon por prepari batalon en Japan-Hondo (= vera lando).

Okinaŭoj (aŭ Okinaŭanoj) ankoraŭ neniam forgesas pri tiu tragedio kaj tiu "Okinaŭa-trakto"! Tial tiam ĉiuj ĵurnalistoj de Okinaŭa insulo diskutinte decidis, ke se tenno volas veni al Okinaŭa, antaŭ ol veni al Okinaŭa, li almenaŭ parolu pri sia militrespondeco pri la lasta mondficemilito. La oficejo de la imperiestra mastrumo rifuzis respondi tiun ĉi peton. Kompreneble, Hirohito ne respondis kvankam ĝi sciis pri tiu trakto de la oficej(estr)o. (... Tamen fine antaŭ ol iri al Okinaŭa, Hirohito fariĝis

bonŝance malsana kaj sekve ĝi ne iris al Okinaŭa).

Se en la mondo ekzistas paradizo kaj infero, ho, Hirohito! ne plu parolante egoisman pretekston, iru al infero(!) kaj almenaŭ spertu tie saman sperton kiel okinaŭoj, koreoj, ĉinoj, ainoj, sudorientaj azianoj kaj eĉ japanoj, ktp, jam havis, dank'al ci!

Hirohito mortis mizere. Ĉu ni devas kontenti? Tenno ankoraŭ postvivas en Japanio. Nova ĝi = aĵo = Akihito ne plu ŝanĝiĝus imperiestro. Sed ĝi estas almenaŭ oficiala impostŝtelistestro!! Tamen hodiaŭ en la industria riĉa Japanio oni preferas donaci monon al li kiel amuleto, ol helpi la 3-an mondon aŭ la 4-an mondon (= malriĉularon en riĉa lando).

Laste mi ne supozas, ke tiom multe da homoj interesiĝas pri ĉi tiu klaĉema skribaĵo, kaj afero de tenno (imperiestro) estas eble tro for por plejmulto de Laŭte-abonantoj, kiuj loĝas ĉefe en Eŭropo. Sed mi volis sciigi, ke ankaŭ tia mondo ekzistas en la sama terglobo.

Monarkisto-monarko Hirohito mortis kaj sammonate la filo de Esperantisto, nome anarkisto-monarkisto Dali, mortis. Kaj nun kia(j) ido(j) restas en la mondo...

= RIMARKOJ =

*1) Laŭ la japana mitologio - el la verkaĵo Nihonŝoki - lia prapaĉjo JINMU-tenno antaŭ ĉ. 2700 jaroj elknedis sanktan Japanion kaj eĉ ĉiun landon de la mondo kiel hom-dio, kvazaŭ dio de kristanismo. Nu, kvankam laŭ la verkaĵo oni devus kredi, ke gepaĉjoj de JINMU estis ŝarkoj...??

*2) En Japanio mortopuno ankoraŭ plu ekzistas kvazaŭ ĉiutaga kutimo.

*3) Ceteraj malkaŝitaj diraĵoj de Hirohito :

- DOMAĜA (pri la universitata konflikto) : "Kvankam mi opinias, ke ĝi estas ĝena afero, tamen mi pensas domaĝe ke mi ne povas diri tion pro mia pozicio, ĉar tio estas politika socioproblemo." (aŭg.'68).

- "MI ESTAS ĈIAM KONSTITUCIA MONARKO" (aŭg.'69)

- "mi AGAS KIEL KONSTITUCIA MONARKO laŭ la inda deziro de mortinta Meiĵi-tenno. Mi agis tiel ankaŭ dum la

milito, same kiel ankaŭ en cetera tempo" (nov.'71).

- ANKAŭ POST LA MILITO SAME KIEL ANTAŬ LA MILITO (pri la roloj de tenno antaŭ la milito kaj post la milito) : "ĉe mia menso NENIA ŜANGIĜO EKZISTAS. Mi ĉiam agis por severe protekti konstitucion." (sep.'75)

- LA EKSKONSTITUCIO (= konstitucio antaŭ la mondmilito) ESTAS DEMOKRATISMO : "Fundamento de japana demokratismo devenas de komenco de Meiĵi-tenno-epoko. Ekskonstitucio estas bazita sur "la 5 sanktaj skribitaj ĵurpromesoj" de Meiĵo-tenno. Mi kredas ke ĉi tiuj "5 ĵurpromesoj" estas bazo de japana demokratismo" (sep.'75) (al eksterlandaj ĵurnalistoj).

- PRI LA MILITRESPONDECO MI NE BONE KOMPRENAS "Mi ne kapablas respondi, ĉar mi ne bone komprenas, ĉar mi ne tro esploras ĉe tia literatura kampo pri la nuanco de tia vorto." (sep.'75)

- HIROŝIMA NE ESTIS EVITEBLA : "Kvankam mi pensas, ke pri la A-bombo-falo estas ĝi bedaŭrinda afero, tamen mi pensas, ke tion oni ne povis eviti, ĉar ĝi okazis dum tia milito malgraŭ ke Hiroŝimanoj estas iel kompatindaj". (sep.'75).

Obscena Krizantemo.

LA IGNORITA SEGREGACIO

Mi ĉiufoje hezitas, kiam volas mi skribi ĉi tiun artikolon, sed finfine kuraĝe mi decidis skribi iun pri tiu ĉiama problemo, kiu malutilas al la senprivilegiitaj personoj de la mondo.

La religiemuloj certe akordiĝas kun mia ideo, kiam mi asertas ke : eĉ la silento pri la sufero de la samuloj ankaŭ estas peko! Mi miene malkontentas, kiam la ĵurnalo publikigas kaj la radiotransistoro blekas pri homaj rajtoj. Mi min demandas, ĉu vere ekzistas homaj rajtoj. Se ili ekzistas, ili do estas nekompletaj. Oni ofte vane parolas pri "apartheid" en Sudafriko, ŝajnigante, ke oni ignoras la segregacion organizitan kontraŭ la rifuĝintoj en la mondo. Tiu menciita segregacio kontraŭ la senradikuloj, la senlandanoj kaj la senhejmuloj (la rifuĝintoj) similas al

"apartheid" en Sudafriko. Kiu nacio ignoras la persekuton travivatan de la rifuĝintoj en la mondo? Multe da landoj konscie (volonte) fermas la okulojn kaj kruele partoprenas en la persekuto al la rifuĝintoj por ĝin kolorigi. Preskaŭ ĉiuj gastigantaj nacioj estas implikitaj en tiu problemo. Afriko kaj aliaj eksterafrikaj landoj distingiĝas en mistraktado kontraŭ rifuĝintoj. La ekstradiciado de la rifuĝintoj verŝajne fariĝas la plej nuna interregistara bonefika komerco. Multe da landoj laŭte trompas la internacian opinion, ke ili estas gastigemaj. Sed ili vere estas mistraktemaj aŭ plie sangaj komercistoj. Kiel en Sudafriko, tiu apartheid-a sistemo speguliĝas en la vivo de la rifuĝintoj. La rifuĝintoj enskatoligitaj en sia kampadejo, de kie ili ne povas eliri sen permeso, similas al la situacio de la malfeliĉuloj de Bantustan aŭ Transkei (nigrulaj kampadejoj en Sudafriko) kiuj ne povas eniri la blankulajn urbojn sen permeso. Ili do laboras kaj estas katenitaj en fermita cirklo disigita de la aliaj partoj de la mondo.

Kiu ignoras, ke la rifuĝintoj ne povas oficiale labori en siaj gastigantaj landoj sen permeso, malgraŭ ke ili estas akceptitaj de la menciitaj landoj? Ankaŭ en multaj kampadejoj la kampadejestro rajtas meti rekte iun ajn erarintan rifuĝinton en malliberejon sen la konsento de la policejo aŭ de la juĝisto por kontroli, ĉu la supozata kulpulo pravas aŭ ne.

La leĝoj faritaj por aŭ kontraŭ la rifuĝintoj, la malamo kontraŭ fremduloj, la maljusteco, la rifuĝintoj senigitaj je siaj rajtoj pro deturno de la projektoj pri memsufiĉo, aŭ aliaj mankoj, vole-nevole kreas segregacion inter rifuĝintoj kaj nerifuĝintaj personoj.

Salisi K. Thombo

Prezidanto de Muungano E-o-Klubo

Box 1737, TABORA, TANZANIO. (East Africa)

MAZDAĴETOJ

Pro amo

Ke mi amas ĉiujn damojn
la kialo estas jena :
mia koro estas simple
de la amo jam troplena.

En iu lando

Kaj efektive
intelektogrado
malkreskas & de
unua parolado.

ĈIES VOĈO

Jakelino :

Pri bonaj homoj kaj bona dio

Mi delonge kutimas al la jena pensmaniero ateista :

1. homoj inventas diojn laŭ sia propra bildo
 2. homoj estas aĉaj
- konkludo : Dio estas aĉa.

Mi protestas kontraŭ la malhumaneco de tiu pensmaniero. Mi konsentas pri la unua aserto. Eĉ se Dio ja ekzistas, ĉiu dikredanto vidas ĝin tra siaj propraj okulvitroj. Ili dependas de la kulturo, de la religia edukiteco, ktp, sed ankaŭ de la propraj virtoj kaj malvirtoj. Stultaj kaj kruelaj homoj stulte kultas al kruelega dio.

Sed ĉu ĉiuj homoj estas stultaj kaj kruelegaj ? Oni ne povas, unuflanke tion aserti, kaj aliflanke esti humanisto. Ne, ne ĉiuj homoj estas stultaj kaj kruelegaj ! Ja kelkaj islamanoj ĝojis, ke suferas iliaj kristanaj malamikoj. Sed kiom da homoj neprofitcele iris al Armenio nur pro solidareco, por helpi al suferantoj ? Kiom da homoj donacis grandajn aŭ malgrandajn monsumojn por helpi al la viktimoj de la tertremo ? Mi rifuzas doktrinion, kies elirpunkto estas la aĉeco de la homaro !

Eble ni povas interkonsenti pri jena aserto : ĉiu dikredanto havas pri sia dio la bildon, kiun li meritas.

Efektive, diktatoroj kaj potenculoj imagas Dion kiel potencon diktaturon. Kaj tiun bildon ili trudas al siaj regatoj per sia tuta potenco fizika kaj mensa. Tial estas homoj, kiuj imagas Dion kiel iun potencon, kiun oni povas preĝi por ke ĝi metu sin je onia servo, havigante avantaĝojn por oni aŭ por oniaj amikoj, iom kiel politikisto, kiu fariĝis ministro, povas havigi avantaĝojn al la distrikto, kiu iam elektis lin deputito : "Sinjoro, se Valon ne trafos la gripo ĉi-vintre, mi donacos pli da mono ĉe la meso kaj recitos du "Ave Maria"-jn antaŭ la ekdormo." Mi konis studentinojn, kiuj metis kandelojn aŭ dirigis mesojn antaŭ

universitataj ekzamenoj. Iliaj preĝoj estis senefikaj.

Sed bonaj homoj havas bonajn diojn. Kristanoj, kiuj malkovras en si mem emon ami aliajn homojn kaj vivi en harmonio kun la tuta kosmo, kredas, ke Dio estas fonto de amo kaj harmonio. Mia kredo estas, ke tiukaze ne plu temas pri produkto de ilia imago, sed ke tiu fonto de amo kaj harmonio ekzistas. Adori Dion signifas krei rilaton inter tiu fonto kaj sia propra psiko.

Sed kio okazas, kiam kristanoj, konforme al la evangelia principo "sabato estas por homo, ne homo por sabato", malobeas ŝtatajn kaj ekleziajn leĝojn por pli bone defendi malriĉulojn kaj ekspluatatojn? Kio okazas, kiam pri fideleco al Dio homoj rifuzas nomi aliajn homojn "mastroj", "sinjoroj", "doktoroj" aŭ "patroj"? Okazas, ke kelkajn jarcentojn poste, mencion pri tiuj dikredantoj oni retrovas en broŝuro pri la antaŭvenantoj de anarkiismo, kvazaŭ defii ŝtatan kaj eklezian aŭtoritaton povus nur homoj sen fido.

Kiel reagus anarkisto al la frazo: "Via aktivado por libereco estas aprobinda, sed kiom bedaŭrinde, ke vi estas anarkisto."? Nu, ekzakte same, kiel reagus kristano, kiu jam dudekan fojon aŭdas la frazon: "Via aktivado por paco estas aprobinda, sed kiom bedaŭrinde, ke vi estas kristano."

Jean-Marc Verger :

Militrifuzo :

Naciaj bataloj por sennaciismo

Mi estas franca konsciencobjetano, kiu rifuzis la duoblan daŭron de la deviga servo, kaj mi estis juĝita pro "dizerto en tempo de paco" la 16an de Januaro.

Unue, mi dankas ĉiujn subtenantojn, kiuj skribis al la Tribunalo por peti ke ĝi senkulpigu min.

Pli ol 100 leteroj, el 13 diversaj landoj gravigis la aferon, kaj montris internacian spiriton de kontraŭstaro al militismo. Maleblas mezuri la influon sur la finan decidon, sed certe utilis por venigi ĵurnalistojn: regiona televido, gazetoj kaj radiostacioj intervjuis kaj raportis pri la proceso.

La verdikto estas 1 jaro da mallibero. Mi apelaciis, kaj

esperas, ke alia juĝisto nuligos tiun tre malfavoran decidon. Fakte, tiu ĉi militema juĝisto jam famiĝis antaŭ 1 jaro en Kanakio: li tre severe kontraŭbatalis kanakojn, kiuj agas por sendependeco de sia insulo - nuntempe franca. Laŭ lia vidpunkto, militrifuzantoj volas eskapi la devigon defendi la nacion; ili petas statuton de konsciencobjetano nur pro malkuraĝo aŭ lacemo!



Rimarkindas, ke esperantlingvaj leteroj ricevataj en la Tribunalo de Amiens, estis sendataj al Paris, kie deĵoras oficiala tradukisto por franca juĝistaro.

Bataloj por la rajto esprimi ideojn alternativajn al militisma politiko gajnas nur dank'al sufiĉe fortnombra premo. Registaroj preferas malebligi laŭparolon al oponantoj, kaj arma defendo facile fariĝas nekritikebla elekto...

Tial, mi opinias ke ĉiuj bataloj por plena rekono de konsciencobjetado meritas internacian solidarecon. Laŭ la landoj, leĝoj kaj objetaj bataloj malsamas, tamen militrifuzantoj komune kontraŭstaras naciismaĉojn, kiuj tiom kostas al la homaro.

Fakte, ĉu ne indus daŭrige uzi esperantistan reton por interligi militrifuzantojn?

De kelkaj jaroj, okazas internaciaj renkontoj ĉiujare, kie konsciencobjetanoj informiĝas pri freŝdataj evoluoj, kaj elektas la landon, kies militrifuzantoj ricevos komunan subtenon okaze de la venanta 15a de Majo, tradicia internacia tago por konsciencobjetado.

La pasintjara renkonto okazis en Bohinj (Slovenio) - 26an, 28an de Aŭgusto. Oni decidis, ke la manifestacioj subtenos militrifuzantojn el Sud-Afriko kaj Namibio la 15an de Majo 1989. Oni konstatis pozitivajn evoluojn en Hungario kaj Pollando, kie oni esperas unuajn paŝojn al alternaiva deviga servo por objetanoj. Okazis ankaŭ debatoj pri 2 malsamaj vidpunktoj: iuj postulas kreon de civila sero, sen ligo kun militisma defendo; aliaj rifuzas ĉiajn

naciajn servojn kaj batalas por malaperigo de tiu abomenaĵo.

Tiuj renkontoj tre utilas, tamen ne sufiĉas. Jam 2 jarojn antaŭe, "grupo de konsciencobjetado" de Sabadell (Katalunio) alvokis por instigi kreon de internacia kunordigo, kiu ebligus regulajn kontaktojn inter la ekzistantaj grupoj pri konsciencobjetado.

Jean-Marc Verger, Lavilletertre, F 60240 Chaumont-en-Vexin, Francio.

Nia kriminala felietono :

La 18an de januaro, Antoine Gasnault estis kondamnita al 8 monatoj da mallibero kaj al la perdo de la statuto de soldatservrifuzanto. Li apelacias. La 25an de januaro, Christophe Albouy estis kondamnita al 15 monatoj da mallibero.

J. DEKER :

Respondo al OKSANA

En "Dikto de lingvo" (*Laŭte!* n°78) Oksana prezentas plurajn demandojn al mi kaj al sennaciistoj. Kvankam mi ne intencis polemiki, mi konsideras, ke estus malafable ne respondi al demandoj. Ĉar mi ne estas artisto nek verkisto, nur sciencemulo, mi ne estas tiom kompetenta por respondi al vi, tamen mi provos.

Nu, mi diras al vi, ke oni ne devas ekstrapoli fikcion en la reala vivo. En fikcio, ĉio eblas, inkluzive de la fantasmoj plej frenezaj de la aŭtoro. Do, en nia kazo mi neniam aŭdis pri trudo de Esperanto kaj sennaciismo fare de sennaciistoj. Neeblas. Supozu, ke la franca registaro, aŭ alilanda registaro, decidus enkonduki Esperanton en lernejojn. Ĝi devus plani la aferon, trejni instruistojn en Esperanto, tiamaniere ke post 10 jaroj aŭ pli oni povu decidi, ke Esp. estu deviga lingvo kiel la nacia. La leĝoj estas tiaj, ke komencantoj, balbutantoj ne rajtus instrui ian ajn temon en lernejo. Post 50 jaroj, verŝajne milionoj da francoj scipovos Esperanton, sed restos milionoj, kiuj malbone konus ĝin, eĉ tute ne. Kaj ĉiukaze oni nepre bezonus scipovi la malnovajn naciajn lingvojn pro la abundo de publikigaĵoj kaj libroj, kiujn ni havas. Tiel vi vidas, ke la plej frenezaj

revoj de la sennaciistoj ne povus okazi antaŭ almenaŭ cent jaroj, kaj eĉ tiam estos ankoraŭ milionoj da homoj, kiuj scipovos la naciajn lingvojn. Estas ankoraŭ homoj, kiuj scipovas latinan, grekan, sanskritan, k.a. lingvojn. Oni ne trudos Esperanton. Eble iam Esperanto trudiĝos, tio estas laŭ miaj konoj la opinio de sennaciistoj. Oni devas ĉiam kalkuli kun la evoluo en la tempo. La loĝantoj de la nuna Francio antaŭ 3000 jaroj parolis keltajn gallajn idiomojn. Poste okazis kunfandiĝo kun latina lingvo. Tio ne okazis en okulsigno, sed tra pluraj jarcentoj. Tio plue evoluis tra la jarcentoj en franca lingvo. Ĉu vi ne konsentas ? Nun neniu scias kiel estis la gallaj idiomoj, kaj kiaj estis la idiomoj uzataj antaŭ la gallaj. Iuj opinias, ke estis vaskaj dialektoj, sed tio estas nur hipotezo.

Pri la diversaj verkistoj, pri kiuj vi parolas, mi kvazaŭ nenion scias. Ĝis hodiaŭ mi sciis nur, ke V. Nabokov verkis "Lolita" sed mi eĉ ne legis la libron. En mia enciklopedio "Larousse", lasta eldono 1984, mi trovis jenajn informojn: Vladimir Nabokov, usona verkisto el rusa deveno, esprimiĝinta en angla kaj rusa lingvoj (St Petersburgo 1890 - Montreux, Svisio 1977). La oktobra revolucio faris el li kosmopolitan migranton, en Francio, Germanio, kiu poste instaligis en Usono, kie li instruis literaturon ĉe Cornell Universitato. Poste sekvas la listo de liaj verkoj, i.a. "Lolita", 1955. El tiu rapida biografio mi povas dedukti plurajn faktojn : Nabokov forlasis Rusion post 1917, li estis tiam almenaŭ 18-jara. Li scipovis du lingvojn, la rusan kaj la anglan. Li estis verkisto, kiu verkis en ambaŭ lingvoj, do verŝajne li pensis en ambaŭ lingvoj. Vi diris en via lasta artikolo, ke li havis malfacilaĵojn por verki aŭ traduki en rusa lingvo. Vi ne precizigas, ĉu tio okazis nur por "Lolita", aŭ por ĉiuj aliaj verkoj. Estas grave, ĉar se estus nur por "Lolita", oni povus supozi, ke la malfacilaĵoj rilatas pli al psikanalizo ol al tradukmalfacilaĵoj. Mi ne scias, sed mi supozas, ke multaj el liaj verkoj estas tradukitaj en diversaj lingvoj. Ĉiukaze multaj aŭtoroj estas tradukitaj en plej diversajn lingvojn, ekzemple Tolstoj estas tradukita en anglan, francan kaj multajn aliajn lingvojn.

Ĉu mi mem tradukis ? Jes, el angla lingvo ĉefe, kaj iom el la germana, sed nur sciencajn kaj teknikajn artikolojn,

ne romanojn, nek poemojn, mi ne kapablus. Oni diras, kaj mi samopinias, ke por traduki romanojn necesas esti mem verkisto : oni reverkas la romanon en alian lingvon. Por traduki sciencajn verkojn necesas havi bonajn konojn pri sciencoj. Tial ofte en dokumentcentro oni dungas inĝenierojn, kiuj scipovas fremdajn lingvojn prefere ol tradukistojn, kiuj ne konas la sciencojn.

Vi ŝajnas mirigita, ke oni povus pensi en fremda lingvo. Verdire tio okazis al mi tute nature, estas kvazaŭ mi daŭrigus mian legadon. Vi mem, kiam vi redaktas artikolon en Esperanto, ĉu vi pensas ukrajne kaj tradukas poste en Esperanton, aŭ ĉu vi redaktas rekte en Esperanto ? Se tio ne okazis al vi, tio povus okazi al vi baldaŭ. Eĉ se vi neniam kapablus pensi en Esperanto aŭ en alia nepatrina lingvo, tio nenion pruvus. Vi scias, la homoj estas diferencaj tiom mense kiom korpe. Iuj havas talentojn por beletro, fariĝas verkistoj ; aliaj fariĝas muzikistoj, komponistoj, aliaj, sciencistoj ktp. El la famaj rapidkalkulantoj kelkaj vidas la ciferojn pasi antaŭ siaj okuloj, aliaj ne. La franca matematikisto Hadamard (1865 - 1963) diris, ke li pensis per bildoj. Mi pensas, ke estas simile al la fenomeno de songo. Pri songoj, iuj havas kolorajn songojn, aliuloj, tute ne. Tio estas nur kelkaj ekzemploj pri la diversecoj, pri la eblecoj, kapablecoj kaj talentoj de la menso. Ĉiuj estas mense malsimilaj.

Do mi ne pretendas pli bone koni pri verkado ol la plej famaj verkistoj, male. Sed mi estas certa, ke tiuj verkistoj kapablus verki en iu ajn lingvo, kondiĉe ke ili lernis ĝin sufiĉe frue.

Vi parolas pri kio nun okazanta en Sovetio. Tio estas la konsekvenco de akra naciismo. Lenin estis kosmopolito, sed Stalin tute ne, li estis aŭ fariĝis naciisto. Sed sincere, ĉu vi opinias, ke la dispartigo de Sovetio en polvo de pli-malpli grandaj landoj kun diversaj lingvoj estus bona afero por tiu lando ? Jam Armenoj kaj Azerbajĝananoj komencas interbuĉi. Kaj morgaŭ la ĉinaj, mongolaj kaj aliaj popoloj ne ruslingvaj tute displitigis la landon. Estus katastrofo, ni revenus al Mezepoko, eĉ pli malalte, ĉar tiam la eŭropaj intelektuloj uzis latinan lingvon. La forto de Sovetio, kiel tiu de Usono, estas la unueco de la lando, la vastaj spacoj, la abundo de krudmaterialo. El tio konsistas la riĉaĵoj de

ambaŭ landoj, kiu permesas la disvolviĝon de sciencoj kaj teknikoj, ĉar ĝi postulas tre gravajn rimedojn. Se Sovetio fariĝus nur amaso da landoj, kiuj interbatalus aŭ ne, tiam ĝi ne plu ekzistus kiel granda nacio kapabla antaŭenirigi la sciencojn kaj la progreson. Vi dezirus ekzemplojn : Jugoslavio, kie estas 8 regionoj, 5 lingvoj, 3 ĉefaj religioj, de post la morto de Tito la ekonomio stagnas kaj estas disputoj inter la popoloj. La kulmino estas senkonteste en Libanio, kie ĉiuj popolanoj, ĉiuj religianoj pafas unu al la aliaj de pli ol 10 jaroj.

Persone, mi tute ne kredas pri estonteco de etnismo. Ĝi estas tro malprogresema teorio, tute kontraŭa al la evoluo de sciencoj kaj teknikoj. Ĝi estas nur bedaŭrinda modo, kiu malaperos baldaŭ. Ni estas baldaŭ enirontaj aŭ eĉ eniris en novan epokon.

Suzanne :

PRI NOV-KALEDONIO

Ankaŭ min ŝokis tia rezonado... Foje oni renkontas esperantistojn, kiuj strange rezonas, t.e. ke ilia rezonado ne kongruas kun la E-spirito....

Nov-Kaledonio. Statuta tempodaŭro : 10 jaroj.

Koncerne la regionan planadon, laŭ la interkonsento, jen la proponita partigo : ĉiuj riĉaĵoj kaj la plej granda parto el la teknikaj bazoj de Nov-Kaledonio estas koncentritaj en la suda provinco, kies loĝantoj estas plejparte kaldoŝoj.

Laŭ la konsisto de la elektantaro, mankos 20 000 voĉoj al la sendependecistoj okaze de la balotado en 1998a. Videble, la ŝtato ignoras la kolonian situacion en Nov-Kaledonio, ĉar ĝi metas sur saman nivelon kolonianojn kaj koloniitojn. Tridek du deputitoj RPCR por la suda provinco kaj dudek du por la du aliaj : norda provinco kaj insuloj Loyautés ; same, koncerne la ekonomian planon : ĉiuj riĉaĵoj en la suda provinco. Koncerne la du aliajn, ilia disvolviĝo similas al tiu de la Tria Mondo.

Fakte, la projekto konsistas el klopodoj por ke la nordaj provincoj kaj la insuloj Loyautés interkonsentu kun la suda kaj, post dek jaroj, la elektontoj juĝos laŭ la rezulto, ĉu la Kanakoj kaj la Kaldoŝoj estis kapablaj, pri la unuaj,

starigi okcidentan disvolviĝon, kaj pri la duaj, tutsimple daŭrigi en tiun direkton, pro la fakto ke la suda regiono estas referenca.

La ŝtato garantiis, en sia helpo, favori la kanakajn regionojn. Fakte, kio okazas ? Skize, du tipodotaĵoj. 1) funkciado : tio, kio ebligas al la administracio funkcii ; tiu dotaĵo estas tiel dispartigita : 50% por la suda provinco, 50% por la norda kaj la insuloj Loyautés. 2) financa ekipado por gravaj projektoj. Unue (28an de junio) estis antaŭkalkuli kvaronon el la sumo por la suda provinco ; la ceteraj trikvaronoj por la du aliaj provincoj. En la novaj tekstoj 40% por la suda provinco, 60% por la du aliaj.

Simbole, ili agnoskas la kolonian fakton, sed, konkrete, tute ne. Ni konstatis tion pri la konsisto de la elektantaro. Ĝenerale, la ŝtato fariĝas arbitrancianto inter la Kanakoj kaj la Kaldoŝoj, inter koloniistoj kaj koloniitoj, metante ilin en la saman planon, ne pridiskutante la koloniadon, eĉ, des pli malbone, ĝin plifortigante.

Se dum tiu dekjara periodo la procezo normale evoluos, sen incidento, kio okazos koncerne la kanakan identecon ? Ĉu plu ekzistos la sendependista movado ? Ĉu ne estas la dezirata celo de la Pons-plano, kiu konsistis detrui ĉian specifon kanakan, ĉian identecon ?

Se post dek jaroj, la sendependistoj sukcesos atingi sian celon, efektive kiel estos la kanakaj kadroj edukitaj de la franca ŝtato, kion garantias la interkonsento.

Krome, se la interkonsento antaŭvidas dekjaran fikstempojn antaŭ la baloto pri memdecido, tio estas por certigi, dum dek jaroj, atomeksplodojn en Mururoa. Fakte, post tia limtempo neeblos al la militistoj ekspluati la lokon, ĉar ĝi fariĝos rompiĝema pro la multaj eksplodoj. Venonta loko : insuloj Kergelen.

Ni ne forgesu la dramecajn murdojn Ouvea/Hienghene inter la plej grandaj amasbuĉoj.

Ĉiu juĝu laŭ sia koro kaj sia konscienco.

(La ĉi-posta artikolo, iam sendita por "Sennaciulo", ne estis akceptita. La verkinto, abonanto de **Laŭte!**, deziras aperigi ĝin nun en nia gazeto, sekvigante ĝin per komentoj verkitaj fine de 1988. Respekte al la formulo de L! kaj kun neniu intenco malafabla kontraŭ la red. de "S-ulo", **Laŭte!** donas al ĉiu la eblecon juĝi mem.

Kribo)

J. DEKER :

LA DRAMO DE NOVA KALDONIO

Mi ricevis antaŭnelonge Sennaciulo-n de Aprilo 1985 kaj legis kun surprizo "Lasu ilin vivi pace". Estas fantazia artikolo. Certe la aŭtoro diras veraĵojn, kaj duonveraĵojn, sed laŭ mia vidpunkto li forgesas multajn aliajn veraĵojn. Tial mi decidis redakti tiun ĉi artikolon por kompletigi la informojn de SAT-anoj. Mi mem iom konas Novan Kaledonion, mi tie trapasis kvinfoje, kaj restadis proksimume entute unu monaton en la lando. Sed kompreneble mi ne ĉion vidis kaj donos referencojn pri miaj diraĵoj. Tiel la legantoj povos kontroli ilin.

Komence, iom pri historio (1). Nova Kaledonio estis popolata jarcentojn antaŭ ol Eŭropanoj alvenis, verŝajne pro migrado de popoloj el Papuazio. Estis ankaŭ Polinezioj en la najbaraj insuloj : Lifu, ktp. Ili vivis laŭ pure melanezaj kutimoj per vivtena agrokulturo (nivele neolitika) (2). La nombro de Melanezoj antaŭ la alveno de blankuloj estas taksita inter 50 000 kaj 70 000, ili estis grupigitaj en vilaĝoj kaj triboj. Multaj dialektoj kaj lingvoj estis parolataj, kaj militoj intertribaj estis oftaj. Kelkaj grupoj praktikis kanibalismon. Bougainville suspektis la insulon en 1768, kiam li navigis sude de Vanatuo. Sed la malkovro estis faro de Cook en 1774. Li elŝipiĝis en Balade (nordorienta marbordo). Poste, multaj navigantoj kaj aventuristoj vizitis la insulon. Maristaj fratoj establiĝis en 1840. Ambaŭ Francio kaj Britio deziris establiĝi en Nova Kaledonio, sed estis interkonsento inter ili, kaj ambaŭ hezitis. En 1850 franca esplorŝipo "Alcme" estis atakata de Melanezoj, kiuj manĝis la tutan ŝipanaron. Ili jam estis formanĝintaj kelkajn katolikajn misiistojn antaŭe, kaj la sankta eklezio kompreneble premis ankaŭ la francan registaron por ke oni protektu ilin. Tial en 1853 Admiralo Février Despointes konkeris la insulon. Tio ne plaĉis al Britoj establiĝintaj en Sidnejo, sed tamen ne estis milito. La starigo de punejo okazis en 1864 kaj daŭris 40 jarojn, ekzakte oni deportis homojn tien ĝis 1897. Oni taksas je 40 000 la nombron de la deportitoj, i.a. estis la Komunumanoj (Louise Michel, Henri Rochefort kaj multaj aliaj). Intertempe kaj longdaŭre poste, ĝis 1917,

estis bataloj kun la Melanezoj, kiuj rifuzis submetiĝi. Sed iom post iom la Francoj establiĝis. La nikelerco estis malkovrita de Jules Garnier en 1863, speco de vetkurado al oro komenciĝis en 1870. John Higginson startigis la nikel-industrion. Post la pacigo la lando disvolviĝis malrapide. Dum la dua mondmilito Usono establis en 1942 malantaŭan bazon por militi kontraŭ Japanio. Tio estis la vera starto de Nova Kaledonio.

Jen pri historio. Pri geografio mi ne parolos multe, mi supozas, ke ĉiuj havas dokumentaron. Tamen mi parolos iom pri la popoloj de Nova Kaledonio, ĉar estas la nodo de la dramo. Laŭ gazeto "Le Monde" (3) estas 145 368 loĝantoj, el kiuj 61 870 Melanezoj (42,56% el la loĝantaro), 53 974 Eŭropanoj kaj asimilitoj (37,12%) (17 000 en 1939 (4), 12 174 Ualisianoj kaj Futunianoj (insuletoj sub kontrolo de Francio, pli ol 1000 km-ojn nordoriente de N.K.), 5 570 Tahitianoj, 5 379 Indonezoj, 5 249 el diversaj devenoj. Fakte, preskaŭ ĉiuj loĝantoj en Nova Kaledonio havas francan civitanecon. Ili rajtas voĉdoni, estas almenaŭ du Melanezaj elektitoj : S-ro Rock Pidjot (Piĝo) deputito de multaj jaroj kaj sendependano, S-ro Dick Ukeiwe, ĉefo de loka registaro kaj kontraŭ sendependeco. Estas eraro aŭ mensogo konsideri, ke Francoj estas ĉiuj nepoj de deportitoj aŭ provosoj. Same kiel en Aŭstralio, multaj venis poste. Multaj estis forpelitaj el Vjetnamio, Nord-Afriko, ktp. La migrado de Indonezoj estis finitaj en 1939. La plej multo el ili naskiĝis en Nova Kaledonio kaj estis edukitaj en tiu lando, en franca lingvo. La Vjetnamoj, Malagaŝoj, ktp, konservis francan civitanecon. La Tahitianoj estas francaj civitanoj kiel la Melanezoj, kaj tial rajtas migri, se sendependeco ne plaĉas al ili. Se okazus sendependeco verŝajne granda parto de la nunaj loĝantoj vole-nevole formigrus dum la sekvontaj jaroj. Tio estas la dramo. La lasta balotado donis 65% kontraŭ sendependeco.

Por pli bone kompreni tiun problemon, vi bezonas scii, ke kiam la Francoj alvenis, Nova Kaledonio estis tre primitiva lando : nenia vojo, nenia urbo. Kompreneble, por iuj kiuj vivas en moderna urbo, tio povus esti alloga kaj eĉ tre agrabla por, ni diru... unu monato, sed la tuta vivo en tiuj kondiĉoj estas alia afero.

La franca registaro pretendas havi interkonsenton pri kunlaborado, sed fakte oni devas ne forgesi, ke post sen-

dependiĝo la loka registaro estos sendependa kaj povos fari kion ĝi volos kun la interkonsento subskribita antaŭe. Ĉiukaze, estos granda regreso. Laŭ miaj konoj, sed pri tio mi ne estas certa, mi ne povis trovi fidindajn informojn : 2/3 el la Melanezoj vivas en kutimaj vilaĝoj, en primitivaj kondiĉoj propravole. La ceteruloj estas civilizitaj kaj okupas diversajn postenojn en moderna vivo. La plejmulto el la Melanezoj estas sendependanoj, aŭ ĉar ili esperas havi pli altajn postenojn, aŭ ĉar ili nur deziras havi la teron je sia profito. Kompreneble, kaf-plantejo povas produkti dum 50 jaroj kiam plantita, kaj ne postulas grandan laboron, se oni kontentiĝas per malgranda rikolto. Pri brut-bredado estas alia afero ; ĉar la okcidenta regiono estas tre seka, kaj kiam estas longa seka sezono, triono aŭ duono de la brutaro mortas pro akvomanko. Ĉiukaze, pro minindustrio agrokulturo estas neglektata, ne estas prospera, kaj tiom perfektigita kiel en aliaj landoj. Nur etblankuloj laboras sur kamparo, la aliaj laboras en urboj aŭ en minindustrioj. Plejmulto el la laboristoj sur la minoj estas nemelanezoj. Parenteze, estas false, ke ne estas sindikatoj en Nova Kaledonio, estas tradicio ĉe la ministoj, kaj la deportitoj de la Komunumo de Parizo postlasis spurojn.

La minoj estas ekspluatataj de eksterlandanoj. Kiam ili estos for, mi ne scias tion, kio ili fariĝos. Jam la situacio ne estas bona, ĉar oni ne bezonas tiom da nikelo kiom antaŭe. Krome, oni malkovris nikelon en Indonezio, kie la laborkosto estas multe malpli granda. Sed la franca registaro naciigis la bienojn de Rotŝild, kaj nun necesas pagi la malprofitojn (500 000 000 da frankoj en 1982) (5), tial oni pli bone komprenas, ke sendependeco interesas multe la francan registaron.

Nun Nova Kaledonio estas tre disvolvita, estas vojoj, lernejoj, hospitaloj, telefono, radio kaj televido. En Numeo estas esplorcentro de O.R.S.T.O.M. (Instituto por Sciencaj kaj Teknikaj Esploroj en Transmaraj Teritorioj), Sud-Pacifika Komisiono, kaj diversaj aliaj institutoj. Por konservi tiujn laborbazojn kaj instalaĵojn necesas mono, laboro, konoj, kiuj superas la eblojn de neolitikuloj. Konsekvence, ĉio estos reduktita al nenio, ĉar ne la primitivuloj zorgos pri esplorado, nek la progresema Melanezoj, ili estas tro malmultaj kaj havos pli profitdonajn aktivecojn. Ver-

ŝajne estos milito inter triboj kiel okazas en diversaj landoj en Afriko. Estas ankaŭ lingva problemo, ne estas unu mela-neza lingvo sed 20 (6) en Nova Kaledonio.

Se vi konsideras tiujn faktojn kaj multajn aliajn, kiujn mi ne povas trakti en tiu mallonga artikolo, vi havas ideon pri la problemoj de tiu lando. Tio, kion mi ne komprenas, estas ke SAT-anoj kaj Sennaciuloj povus subteni sendependiĝon de primitivaj popoloj, kiam oni bone scias, ke tio kondukas al mizerego de la popoloj dum tre longa tempo. Ĉu la ekzemplo de Afriko kaj de multaj landoj ne sufiĉas, ĉu ne sufiĉas la Idi Amin Dada, Milton Obote, Kwane N'Khruma, Ahmed Seku Ture, Bokassa ktp... ? Eble Rock Piĝo kaj Tjibaŭ ne estas tiel, sed nenio pruvas tion. Kaj kiom da tempo ili restos la mastroj ? En Madagaskaro Prezidanto Tsiranana (Ciranana) estis brava homo, sed poste... Nun estas simple, Madagaskaro estas ruinigita, estas nur koruptado kaj nigra merkato. Mankas medikamentoj kaj mankas preskaŭ ĉiuj varoj importataj, krom tiuj, kiujn la trafikantoj akiras en Reunio. En Madagaskaro granda parto de la popolo estas multe pli evoluinta ol la Melanezoj. Por restarigi Madagaskaron en la saman situacion kiel en 1960, necesus miliardoj da frankoj, kaj eble 10 jaroj da laboro. Tio post nur 25 jaroj da sendependeco en riĉa kaj disvolviginta lando kia estas Madagaskaro. Cetere vi povas legi en viaj gazetoj multajn artikolojn pri la fariĝo de tiuj landoj.

Kial ni, SAT-anoj, kontraŭnaciistoj, deziras helpi al naciistaj ambiciuloj, kiam ni estas kontraŭ naciistoj en propra lando ? Kial ?

Referencoj :

- (1) Pacific Year Book, 13th edition 1978, Pacific Publication, Sydney, Aŭstralio.
- (2) D.L. Oliver : Les îles du Pacifique, Payot, Paris 1953, p.276. Franca traduko de : D.L. Oliver Pacific Islands, Harvard University Press, Cambridge, Usono.
- (3) Le Monde - Sélection, hebdomadaire n° 1882, 22/28 nov. 1984, p.7.
- (4) D.L. Oliver (2), p.279
- (5) Atlaseco 1983, Parizo.
- (6) D.L. Oliver (2), p.277.

La splendaĵoj de la cenzuro ĉe SAT



La artikolo, kiun vi legis ĉi-antaŭe estas la fi-fama artikolo pri kiu parolis Kdoj Peyraut kaj Barkoviĉ en la kongreso de SAT en Campos da Jordao, kiel ekzemplo pri io nepublikigebla en **S-ulo**.

Tiu artikolo havas historion, kiu verŝajne interesos la legantojn de **Laŭte!**. La SAT-anoj memoras pri la artikolo aperinta frontpaĝe de **Sennaciulo** n° 959 de Aprilo 1985 "Lasu ilin vivi pace - La problemo de Nova Kaledonio". Tiu artikolo estis ofendo por tiuj, kiuj konis ion pri Nova Kaledonio. Ĝi kaŭzis respondon de Kdo Aunis en **S-ulo** de Junio 1985, kiu provis reĝustigi la plej krudajn erarojn. Eble estis aliaj protestoj, sed ili ne aperis en S-ulo. Mi mem estis en Tongio kaj mi ricevis la gazeton kun multe da malfruo, eble en fino de Novembro, se mi bone memorus. Mi opiniis utile verki pli ĝustan artikolon, kaj mi strebis verki ion interesan kaj veran pri tiu lando. Mi sendis al Kdo Barkoviĉ komence de 1986 la artikolon, kiun vi legis, kaj samtempe alian artikolon titolitan "Rasismo, etnismo kaj naciismo". Nenia respondo, plena silento, mi eksciis poste ke estas kutimo ĉe SAT, ne respondi. Mi korespondas kun amiko Petro Jayer de tempo al tempo, kaj mi parolis al li pri tiu artikolo. Li petis de mi sendi kopion al li kaj poste li mem sendis la artikolon al Rolando Grandière. Estis komence de 1987. Denove silento. Kiam mi partoprenis la kongreson en Bulonjo ĉe Maro, Grandière diris al mi, ke li transdonis la artikolon al Barkoviĉ por aperigi ĝin, pro tio ke mi vizitis Novan Kaledonion, la alia artikolo ne estis tiom interesa, ĉar ĉiu ajn povus verki ĝin. Barkoviĉ tute simple diris, ke li ne havis sufiĉe da loko por aperigi ĝin en S-ulo.

Poste, en Februaro 1988, mi ricevis novan leteron de mia amiko Petro Jayer, kiu transdonis al mi la respondon de Barkoviĉ al Grandière pri mia artikolo. Jen la teksto de tiu letero :

Kara Rolando,

Kiel ci petis tion, mi redonas al ci la artikolon de Deker, kiun mi ne aprigos ĉar :

1 - Tiu artikolo estas komplete influata de la koloniista pensaro : la

"primitivulo", Francio (Britio, ktp) alportis civilizacion al indiĝenoj"
ktp.

- 2 - Ni ĉiuj bone scias, ke la sendependiĝo alportis mizeron. Sed tio ne estas NIA problemo, sed ILIA problemo.
- 3 - Nacia liberigo kaj sociaj ŝanĝoj estas intime ligitaj - la duaj povas okazi NUR kiam malaperis la subpremo, la jugo de la invadistoj (oni povas kiel sennaciisto bedaŭri tion).
- 4 - La interligado inter "metropolaj" kaj koloniigitaj laboristoj neniam funkciis. Ĉu SAT kapablos ĝin realigi por Nova Kaledonio ? Ŝajnas ke la "potencaj" politikaj partioj (P.S., P.C.) kaj sindikatoj (C.G.T., C.F.D.T.) ne sukcesis krei tiun sennaciecan laboristan solidarecon.

Laŭ mi, nur tio, kion oni povas skribi en nia gazeto, estas la disvolvigo de tiu lasta punkto : "Kial SAT-anoj povas influi sur la destino de la kanaka kaj franca laborista klaso?"

Tiujn klarigojn ci povas transdoni al k-do Deker.

Amike IVO.

Nu bone, Barkoviĉ ne volas aperigi mian artikolon, li rajtas preferi siajn fantasmojn. Finfine la surprizo estas la ricevo de S-ulo n-ro 1001 de Novembro 1988, p.111, kie mi estas grave atakata ne nome, almenaŭ en la gazeto. En la kongreso, mi ne scias, ĉar mi ne partoprenis al ĝi.

Nun kiam vi legis la artikolon, vi povas per vi mem juĝi, ĉu mi skribis ion kontraŭan al la SAT-principoj. Ĉio, kion mi skribis, estas laŭ miaj scioj strikte vera, mi citas la referencojn. Oni ne povas diri same pri la artikolo de A. Stiern. Mi estas SAT-ano de 48 jaroj, mi vivas en tria mondo de antaŭ 40 jaroj, mi restas fidela al mia idealo, ĉu mi devas nigrigi la situacion jam sufiĉe nigran en Nova Kaledonio, diri historiajn mensogojn por plezurigi K-dojn Peyraut kaj Barkoviĉ ? Ĉu Barkoviĉ juĝas la SAT-anojn stultuloj, kiuj neniam legas la naciajn gazetojn kaj librojn, kaj kiuj ne estas bone informataj ? Estas la malo, SAT-anoj estas kleraj homoj, kiuj interesiĝas pri politiko kaj pri socia vivo. "Ni ĉiuj bone scias, ke la sendependiĝo alportis mizeron. Sed tio ne estas NIA problemo, sed ILIA problemo", ĉu tio ne estas pura cinikeco ? La tria paragrafo de lia letero estas tute falsa kiel ĉiuj povus konstati. Li pripensas eĉ ne unu minuton, ke ni estas ankoraŭ en kapitalista sistemo, se morgaŭ socialismo aŭ komunismo okazus, ni povus ankoraŭ pli helpi al disvolvado de tiuj landoj, dum, se ili estus sendependaj, ni nenion plu povus fari

por tiuj landoj.

SAT estas kultura organizo, kiu ne havas politikan potencon, do ni ne bezonas cenzuron, nenio malhelpas, ke SAT-anoj esprimu siajn konceptojn, raportu pri historia disvolvado, ĉefe se tiuj konceptoj ne estas tiom cinikaj kiom tiuj de Barkoviĉ. Lanti diris multe pli ol mi. Ĉiukaze kiam temas pri veraj faktoj, kial rifuzi ilin ? Estas ne-neadeblaj faktoj, ke ni vivas ankoraŭ en kapitalista reĝimo, ke ekzistas ankoraŭ popoloj, kies vivkondiĉoj kaj etoso estas ankoraŭ tre primitivaj.

En Nova Kaledonio ne estas rasapartigo, la Melanezoj vivas same kiel la aliaj popoloj en urboj kiel Numea. Mi spertis, ke ne estas la sama kazo en Aŭstralio. La fakto estas ke oni ne renkontas aborigenojn ne nur en Sidnejo kiel konstatis Lanti en 1938 (Sennacieca Revuo n°62, 10 Aprilo 1938 Letero el Aŭstralio); sed mi mem en 1978 vojaĝis marborde tra Kvinlando de Brisbano ĝis Cairns (proksimume 1500 km.) sen renkonti aborigenojn en la urboj kaj urbetoj, sed eĉ ne unu aborigenan vilaĝon survoje. En N.K. ĉiuj estas intermiksita en la urboj kaj estas melanezaj vilaĝoj sur la kamparo, kaj izolitaj domoj de plantistoj.

En "Atlaseco 1987" - mi ne ricevis ĝis nun la eldonon de 1988 - oni povas legi ĉe ĉapitro pri Nova Kaledonio, p.268 - 69, diversajn informojn. Interalie, la agrokultura produktado estas tute ne sufiĉa pro la malgranda produktiveco de la Melanezoj (kompreneble ili uzas kultivajn prametodojn). Sen la helpo de franca registaro, la Brutta Nacia Produktado por loĝanto, kiu estas US.\$ 5 732 jare, falas je ĉirkaŭ US.\$ 804 kiel en Okcidenta Samoa. La diversaj helpoj de la franca registaro estas proksimume 50% de la B.N.P. Tio dank'al la minoj, ĉar en Reunio kaj aliaj departementoj la helpo de la metropolo estas taksata je 80%. Antaŭ 15 jaroj K-do Selle batalis por la sendependiĝo de Reunio en **SAT-Amikaro**.

Por fini, en "Le Monde" de la sabato 3a de Decembro 1988, estas artikolo de Daniel Vernet, kie estas agnoskata, ke Kanakio bezonas stabon por funkciigi la landon. Tio estas pli facile direbla ol farebla, ĉar necesus, ke la popolo unue sentu la bezonon studi. Poste ne necesas, ke la inĝenieroj, ktp, ne forkuru kiam okazos sendependiĝo,

kiel tio okazis en multaj landoj. Ĉar oni ne formas stabaron en kelkaj jaroj, necesas multe da homoj kleraj, por ke oni povu selekti la plej kapablajn. Tion oni volonte forgesas en Eŭropo, kie la kleruloj abundas, tio ne estas la kazo en la tria mondo. Kaj tio estas la ĉefa kaŭzo de la fiasko en multaj el tiuj nove sendependaj landoj. Sed ĉu Barkoviĉ spertis tion, konscias pri tio ?

Konkludo : Kiam oni volas cenzuri, necesas bone informiĝi antaŭ ol agi.

J. DEKER.

P.S. : Mi povas aldoni 2 referencojn pri libroj facile trovblaj, kiuj donan bonan skizon pri N.K. kaj riĉe ilustritaj. B. Hermann, H. de Camaret : Nouvelle Calédonie - Editions du pacifique Papeete - Tahiti, Polynésie Française 1975 (estas pluraj reeldonoj).

M. Shadbolt, O. Ruhan : Iles of the South Pacific National Geographic Society, Washington U.S.A, 1968.

VALO :

Urĝe plenumenda tasko

Kiel ĉiuj maljunuloj mi kutimas ripetadi. Ĉiujare, en mia respondo al referendumo de **SAT-Amikaro**, mi ripetas saman deziresprimon.

Kiam aperis la Plena Gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien, Lanti kritike diris : "Jen ni havas tro plenan Gramatikon, dum mankas al ni sufiĉe plena vortaro". Li sin dediĉis al forigo de tiu manko, kaj lia klopodado atingis la celon : Grosjean-Maupin ellaboris P.V., poste Waringhien ĝin pliampleksigis, kaj transformis al PIV. Nun la tutmonda esperantistaro disponas tiun altvaloran, nemalhaveblan ilon.

Tamen restas manko. Ankoraŭ longe, krom raregaj esceptoj, ne ekzistos denaskaj esperantistoj. Tial ni ĉiuj, precipe la tradukistoj, bezonos plenajn nacilingvajn-esperantajn vortarojn.

Ni franclingvanoj estas bonŝance provizitaj per la bonega Grand Dictionnaire Esperanto-Français. Tio eĉ pli sentigas al ni la bezonon pri Grand Dictionnaire Français-

Esperanto.

Tial mi ĉiujare ripetas, ke SAT-Amikaro devas iniciati la ellaboradon, kune kun UFE, de tiu GDFE, kiu estos inda omaĝo al la memoro de Grosjean-Maupin kaj al nia kamarado Waringhien.

Eble ne ekzistas nun la monrimedoj por certigi eldonon de tiel ampleksa vortaro, vendebla nur en la limoj de franclingvio ; sed tio estas flanka demando, poste solvota. La unua urĝa afero estas preparado de la materialo, kaj ĝi ne necesigas investon de grandaj monsumoj. Nek pezegan laboron por unu homo, ĉar ĝi povus kaj devus esti kolektiva.

Mi vidas la taskon dividenda laŭ kvar sinsekvaj ŝtupoj.

Unua ŝtupo : kolektado de francaj vortoj el francaj vortaroj (Larousse, Littré, Robert). Tasko plenumenda de dudeko da teamoj, po unu por ĉiu alfabetlitero, aŭ por pluraj nemulte uzataj (w, x, y, z...) Tio ne necesigus specialan kompetenton : ĉiu neanalfabeta franclingvano kapblas ĝin fari. Tiel oni ricevos unuan parton de sliparo.

Dua ŝtupo : kompilado el franc-esperantaj vortaroj (Grosjean-Maupin, Albault/Léger...) kaj, per inversa esplorado, el GDEF. Tiel kompletigos granda parto el la sliparo. Sur tiuj du unuaj ŝtupoj estos utile uzeblaj mini-komputeroj.

Ĉe la tria ŝtupo pli kompetentaj personoj kribros la kolektitan materialon, eliminis erarojn kaj misojn, elektos en ĉiu loko la plej ĝusta(j)n vorto(j)n, kaj tiel konsistigos la kernon de la vortaro.

Tiam restos vakuoj : francaj vortoj sen esperanta ekvivalento. Estos la tasko, sur la kvara kaj lasta ŝtupo, de akademianoj, diplomitoj (pri altaj esperantaj studoj kaj aliaj altnivelaj kompetentuloj, plenigi tiujn truojn per lerte kombinitaj kunmetaĵoj kaj neologismoj jam iniciatitaj de bonaj aŭtoroj, sed ankoraŭ neregistritaj en antaŭaj vortaroj ; aldoni klarigojn, ekzemplojn...

Fine, la tuta materialo estos preta por enpaĝigado, presado, eldonado. Oni povos atendi trankvile, ĝis estos akiritaj la necesaj monrimedoj - dume pliriĉigante la tuton laŭ la evoluado de la du lingvoj. Sed, ĉar la ĉi-supre difin-

ita preparado daŭros sufiĉe longe, estas necese tuj komenci per konsistigo de la unuaŝtupaj teamoj.

En ĉio ĉi, kompreneble, oni povas anstataŭigi "franĉa" per "angla", "hispana", "ĉina", ktp, ĉar por ĉiu lingvo necesas Granda Vortaro Nacilingva-Esperanta.

ERGOTO DE BONAERO : ESPERANTALO, LA POEZIA JARGONO

La malamikoj de Esperanto enfiltriĝis en niajn vicojn, kaj senlace laboregas por detrui Esperanton! Tiuj malamikoj agas plej ruze, inside kaj perfide : Ili ŝajnigas verki, traduki en Esperanto, sed fakte ili tion faras en Esperantalo (iu ĵargoneca deflankiĝo de la klasika Zamenhofa Eo) konsistanta en la uzo kaj trouzo de poezivortoj ne nur en poezio, sed, plej damninde kaj kondamninde, kaj tute senrajte, en prozo! (Ĉar ja se temas pri poezivortoj, kion ili faras do en prozo?), kaj per uzo kaj trouzo de nenecesaj neologismoj! Necesaj neologismoj estas : KOMPUTORO, KASEDO, DISKEDO, sed ĉu apud PRINTEMPO necesus : PRIMAVERO, SPRINGO, VISNAO ? Aŭ ĉu apud MALPURA necesus BRUDNA ? Ne, certe ne, karaj samideanoj! Per tio la Esperantalistoj brudnigas Esperanton per brudnaĵoj, nome, malpurigas Esperanton per rubaĵoj! Ili devas esti sinceraj kaj konfesi, ke ili verkaĉas en Esperantalo!

Tial mi atentigas la Esperantistojn pri tiu fia invado, tiu nigra tajdo de Esperantalistoj aliyestitaj kvazaŭ Esperantistoj, kiu endanĝerige minacas aŭ minace endanĝerigas nian karan lingvon per kokoliĉa-kiĉa verkado-tradukado. Ili konsistigas la kvinan kolumnon en Esperantujo!

Kaj ĉe apero de libroj en Esperantalo, niaj eldonejoj, publikigaĵoj, recenzistoj havas la devon averti, ke tiuj libroj estas en Esperantalo!

Jen ekzemplo eltirita el la romano de Manuelo KOFINJO, en JUNIO/1987a aperinta en Kubo : LA LASTA VIRINO, kiun el la kastiliana (= amerikhispana) lingvo tradukis al Esperantalo : Arnoldo AGILAMIKELO, p.17a : En Esperantalo : Ili parolis p^oke... svage respondis, laŭ scipovis... kvazaŭ timigutaj!!! Satira ŝerco : Ili parolis foke... smage* respondis... kvazaŭ timigitaj gutoj!!! (* SMAGE : kiel

(s)vaganta mago! En korekta Esperanto : Ili parolis malmulte... neprecize respondis, kiel scipovis, kvazaŭ timigitaj. (Kvazaŭ timigitaj, egalas al : Kiel se ili estus timigitaj!)

Jen alia ekzemplo de la kokoliĉa ĵargono Esperantalo :

Varo kiĉa, kokoliĉa, durosketa, stinkopreta, Haŭpentalo aŭ Piĉala, aŭ Dediĝa aŭ Knetega, aŭ Dekoka aŭ Oldoka; jen fuŝado ja malpoka! Straŝne smunga, svore broka! Broka, broka, ja broka-nta! Far' de ili = blek' de ili, bleka, bleka, ja bleka-nta!

Rimarkendas ke PIV registras ne nur vortojn en Esperanto, sed ankaŭ en Esperantalo, kaj distingas ĉi-lastajn per specialaj signoj! Tamen tio kreas konfuzojn kaj nepre bonvenus elpurigita nova eldono de PIV en VERA ESPERANTO, kaj aparta kajero de Esperantalo, por tiuj homoj dezirantaj dediĉi sin al tiu specifa ĵargono kokoliĉa-kiĉa! (Por filistro ŝatanta sengustajn artaĵetojn).

Preterpase, kiel eblas ke en Akademio de Esperanto, kies membroj devas esti Esperantistoj, troviĝas pluraj Esperantalistoj? Ili devas aperi en aparta listo (de la UEA-Jarlibro) por la Akademio de ESPERANTALO!

Jen ili : Fernando DEDIEGO, Edvino DEKOKO, Renaro HAŬPENTALO, Leopoldo KNETO, Karelo PICALO. (Rimarko : Eble kun DEDIEGO, la plej granda Esperantalisto; tial li meritas la aldonitan sufikson: -ALO, kiu ne estas tia en Haŭpentalo!)

Duon-Esperantalistoj aŭ simpatiantoj verŝajne estas : Roĝero BERNARO, Marga BULTONO, Johano REGULOPEREZ kaj Gastono VARENGIENO.

Se mi preteratentis iun, bonvolu averti min!

Posta skribo : La "Biblio" de Esperantalo kaj de ĝiaj akolitaj estas memkompreneble la fifama **Parnasa Gvidlibro!**

MAZDAĴETOJ

Nenio nova

Amo kaj amoro internaciskale (sendepende de ni) samas ĝenerale.

Ne pli ofte

En mia aĝo, kiel sciante, amoro nur jam ĉiusabate.

KRUCVORTOJ de Sfinksido


Horizontale :

1. Doktrino iniciatita de Zamenhof (s.f.).
2. Jura nuligo de leĝo aŭ malpermeso de kutimo.
3. Leonbleki. - Eŭropa lando (s.f.).
4. Ornami per lumiloj. - Sufikso uzata por formi nomojn de enzimoj.
5. Kontraŭdronilo.
6. Rilata al kverka frukto. - Rilata al unu movo en ia direkto.
7. Du, ĉe la malamikoj de Asteriks. - Idnaska. - Io konkreta.
8. Kiel brilas flagranta flamo. - Dekoracio (s.f.).
9. Azia arbedo.
10. Parto de instruejo, kie loĝas lernantoj (s.f.).
11. Aristokrata dramo. - Ŝnuro kudrita laŭlonge de la rando de velo.

Vertikale :

1. Ne estas la ĉarmo de ŝia voĉo, kiu altiras la klientojn (s.f.).
2. Antikva greka monereto (s.f.). - Talofita planto, temo de faka verkego, antaŭnelonge eldonita esperantlingve.
3. Rilata al arbo, kies folioj de blanka specio nutras la silkvermojn. - Elektra unuo (alia ortografio).
4. Alie (laŭ Zamenhofs uzado).
5. Nacia prefikso pri Indonezio. - Johano por la Rusoj (s.f.). - Eligata de iu, kiu elmetas sin al malvarmo.
6. Glanda kaveto. - En la nomepiteto de araba golfo.
7. Kunfiksi du metaltavolojn per iaj metalaj pecoj. - Malgrandulo (s.f.).
8. Belulino, kiun amanto transformis en bovinon por ŝirmi ŝin kontraŭ la ĵaluzo de la edzino. - Eldiri dusencaĵojn al zorgoplenaj konsultantoj.
9. Nepre portenda vintre. - Interjekcio.
10. Turka greno. - La malkovro de nova estigas kuregon de oresploristoj.

SOLVO de L! 80. Hor. : 1. VESPERIĜAS. 2. EGE. PEILO. 3. NOKTO-VAGUL. 4. ERPI. OMO. 5. RACIE. ALEO. 6. AGO. INGOT. 7. LO. ESEO. UM. 8. TRANOKTADEJO. 9. EDOMO. EFOD. 10. RITO. AVENO. 11. ELOVIĜOS. Ver. : 1. VENTRALTERE. 2. EGO. AGORDIL. 3. SEKECO. AOTO. 4. TRI. EKMOV. 5. EPOPEISTO. 6. REVI. NEA. AĜ. 7. IRA. AGODEVO. 8. ĜIGOLO. EFES. 9. ALUMETUJON. 10. SOLOO. MODOJ.




LA LEĜO DE L'PENDOLO

(EI : KOMENTOJ PSIKOLOGIAJ AL LA VERKOJ DE

GURDIEFO-USPENSKO

- fare de D-ro Maŭrico NIKOLO - Vol.1)



La leĝo de l'pendolo signifas la osciladon de la aĵoj inter la kontraŭoj.

En la naturo : vintro-somero ; la movoj de la tajdoj, de l'marondoj. En la homo : simpatio-antipatio ; deziro-naŭzo ; feliĉo-senkuraĝiĝo ; amo-malamo ; jeso-neo ; certeco-dubo, kaj tiel plu. Ĉi tiuj pendoloj havas malsaman longecon de oscilado. La periodo de nia vivo oscilas inter la naskiĝo kaj la morto.

En la Libro pri la Ekleziaĵo de l'Biblio oni diras : "Ĉiuj aĵoj estas duoblaj, unu kontraŭ la alia." Kio signifas, ke en ĉio estas kontraŭo pro kiu ĝi ekzistas kaj al kiu ĝi oponas. (Preterpase : En la dialektika materialismo oni asertas ke la aĵoj suferas ŝanĝon ĉar ili enhavas siajn kontraŭojn!) La mallumo kunportas implicite la lumon, kaj kune ion duoblan : lumon-mallumon, kiuj dividite ekestas lumo aŭ mallumo. Ĉagreno-ĝuo ; malsato-sato. Oni ne povas havi unun sen la alia, same kiel oni ne povas havi stangon kiu ne havas du pintojn. Ĉiuj fenomenoj, eventoj,

videblaj aĵoj troviĝas inter oponaj fortoj ; milito sekvas pacon, kaj paco sekvas militon. Manko sekvas post abundo, kaj abundo sekvas post manko. La tempo malsamas en malsamaj tempoj. En eta skalo : Hodiaŭ ni pasigas agrablajn momenton, eble morgaŭ ni havos malbonan sperton.

En la Predikanto (3, 2-8) oni legas : "Estas tempo por naskiĝi kaj tempo por morti ; tempo por plori kaj tempo por ridi ; tempo por silenti kaj tempo por paroli ; tempo por ami kaj tempo por malami." Ĉi tio signifas, ke ĉio atingas sian finon kaj transformiĝas en sian kontraŭon en la tempo.

En la sankta templo de Delfo eblis legi du skribaĵojn : "KONU VIN MEM", "NENIO EKSCese" (Nome, trouzu nenion). Ĉi tio signifas : Homo devas koni sin mem kaj POSTE li ne devas iri al la ekstretoj, nome, li konas sin mem kaj konas siajn ekstretojn. Koni sin mem implicas (inter aliaj aĵoj) la konon de la kontraŭoj en oni mem, nome, ekesti konscia pri ili. Tiam oni povas kompreni kaj apliki la duan aforismon : "Nenio ekscese".

La homo devas klopodi kompreni sian nulecon. La celo estas atingi pozicion kiu troviĝas (psikologie) inter la kontraŭoj, nome, en la meza punkto de la pendol-oscilado. (Ne iri de unu flanko en la alian), ĉar inter la kontraŭoj estas ĉiuj eblecoj de kreskado ; ĉi tie venas al ni la influoj de l'superaj niveloj, ĉi tie estas la loko kie oni povas senti la propran nulecon, kaj sekve oni estas libera de kontraŭdiroj, oni ricevas influojn kaj signifojn devenantajn el la superaj centroj kiuj ne havas kontraŭdirojn.

Se oni ne konsideras sin bona aŭ malbona, se oni ne fieriĝas esti justa aŭ ne, se oni ne pensas ke oni ricevas bonan aŭ malbonan trakton, se oni ne lasas sin treni de ajna povo per la identiĝo, nome, se oni ne identiĝas, ONI ATINGAS ĈI TIUN MEZAN POZICION.

En ĉiu manifestiĝo estas 3 fortoj. Ni ne vidas la 3an forton ĉar la formiga aparato laboras inter la kontraŭoj kaj por ĝi ĉio "estas tia" aŭ "ne estas tia" (jes aŭ ne). La harmonio de la kontraŭoj estas en la forto peranta inter ili. Tio ne signifas ke la 3a forto estas nur unuigo de kontraŭaj fortoj. Ĝi estas malsama forto je kiu ni ne estas

senseblaj en la ordinara stato ; nomata neŭtraliga forto en la Psikotransformismo, kaj Sankta Spirito en la Nova Testamento.

La 3a forto estas ĉiam inter la kontraŭoj : ĝi estas la meza punkto en la pendol-oscilado. Se oni forprenas la senton de l' MI el la du pendol-flankoj, oni ne plu sentas sin tra la kontraŭoj; la sento de l' MI translokiĝas en la centron, en la "nenion" (nulecon aŭ neniecon). Ĉi tie, en la mezo, troviĝas la loko aŭ stato kie estas la REALA MIO ; la REALA MIO aŭ MASTRO venas de "supre", nome, de supera nivelo. Ni povas atingi ĝin nek el unu kontraŭo nek el la alia.

Atingi la REALAN MION estas renaskiĝi. (Ekzemplo: Kristo sur la kruco inter 2 ŝtelistoj: inter Dimas', la bona ŝtelisto, kaj Gestas', la malbona ŝtelisto). La kontraŭoj estas ŝtelistoj ĉar kio konstruiĝas en unu, estas subfosata de la alia ; la ĝojo kondukas al la ĉagreno, sed tio konstruita meze povas perdi nenion.

Ni vidu la KOMPRENON, ekzemple. Se vi vere komprenas ion, se vi vidis en vi mem vian veron, vi estas en la mezo, vi ripozas en la 3a forto.

La scienco aŭ la scienculoj vidas nur 2 fortojn : ago kaj reago = (kaŭzo kaj efiko). Ĉi tio akordiĝas je nia kutima maniero de pensado ĉar la formiga aparato ne povas vidi la 3an forton; ĜI NE POVAS KOMPRESNI ĜIN! Por kompreni ĝin necesas nova menso, nova maniero de pensado.

La 3a forto aŭ NEŬTRALIGA forto.

La vorto "neŭtra" devenas el la latina : NE UTER : nek unu aĵo nek alia, nome, ĝi apartenas al neniu el la du kontraŭoj. (Neŭtra genro : nek maskla nek femala. Ne-transitiva verbo : nek aktiva nek pasiva.) En politiko NEŬTRALA signifas ke oni restas inter du kontraŭaj partioj. En kemio, neŭtra salo: nek acida nek alkala. Militisme ĝi signifas ke oni helpas nek unu bandon nek alian. En elektro, neŭtra signifas : nek pozitivan ŝarĝon nek negativan ŝarĝon. En meĥaniko : neŭtra punkto signifas punkton kie malsamaj fortoj estas en ekvilibro.

NEŬTRALECO : klini sin nek al unu flanko nek al la

alia, nome, foresto de ekstremaj opinioj, de partia vidpunkto. NEŬTRALIGI : Fari ke aĵo estu nek aktiva nek pasiva ; estigi ekvilibron.

Sed en la PSIKOTRANSFORMISMO, neŭtraliga forto signifas ke ĝia naturo estas tia ke ĝi estas nek aktiva nek pasiva, sed tute malsama de ili, sekve, ĝi estas neŭtra, laŭ la vortara difino : Nek unu aĵo nek la alia, sed kvankam ĝi estas nek unu aĵo nek la alia, ĝi estas IO.

La 3a forto manifestiĝas kiam ni memoras pri ni farante la neidentigon.

Preĝi meĥanike aŭ perforte aŭ tragedie (aŭ pro devo aŭ pro kompato) kutime ne donas rezulton. Oni devas preĝi konscie. La 3 centroj devas esti "enfokusigitaj"; ĉi tio okazas kiam ili estas meze de la pendol-oscilado kaj ne en unu el la ekstretoj.

La MEMORO PRI SI estas batali por esti en la 3a forto.

La NE-IDENTIĜO estas batali por ne esti en la 2 kontraŭaj fortoj.


Kiam ni agas disde unu pendol-flanko, kiel kiam ni diras en la vivo (nome, kiam ni agas identigante) : "Ĉi tio estas tro!", ni spertas nur la kutiman agon-reagon de la kontraŭoj. Mi batas vin, poste vi batas min, poste mi batas vin, kaj tiel senfine. Ĉi tiu estas la vivo, la iro-kaj-reveno inter la kontraŭoj. Ĉi tio estas "alsupri la krutaĵon" kaj poste "fali de sur ĝi".

Kiam vi sentos la strangan forton de la laboro (pri si), vi komprenos ke vi ne povas solvi la malfacilaĵojn per partia kaj perforta agado.

La celo de l'Memoro pri si estas atingi la mezan punkton de l'pendolo (3a forto), tiun lokon kiu estas nek je unu flanko nek je la alia de la kontraŭoj, kaj kiu estas novaj sperto, konscio kaj kompreno.

Ĉiu identiĝo apartenas al la kontraŭoj.

Resumtradukis : ERGOTO DE BONAERO



RAJTO DE MALSIMILECO

aŭ

INTEGRADO

de la MALPLIMULTOJ ?

(daŭrigo de p.10)

VIVU LA DIVERSECO !

Ĝis, la lokon, kie mi kreskis. Miaj gepatroj parolis al mi la francan, nutris min laŭ la kutimoj de francoj, kaj mi kreskis inter la loĝturoj de departemento Seine Saint Denis, apud Parizo (tamen, en tiu tempo, ankoraŭ estis tie ĝardenoj). Tiu faktoj ne dependis de mia volo.

Tiu frua kondiĉado estas neŝanĝebla. K-do Bartelmes, kiu estis sincera kaj fervora sennaciisto, kalkulis en germana lingvo, ne en Esperanto. Lia nacia lingvo determinis lin ĝis la fino de lia vivo.

Gepatroj povas elekti la lingvojn, kiujn ili parolos kun siaj infanoj. Mi ne scias, ĉu plurlingvaj infanoj estas pli feliĉaj, ol unulingvaj. Ŝajnas, ke la sperto de alzacanoj estas, ke ĉiam unu lingvo fariĝas por la infano pli grava, ol la aliaj. Mi ne havas sperton pri tio, sperton havas aliaj laŭtuloj, do ili rakontu al ni pri tiu temo.

Kion individuo povas fari, kiam li havas tian agon, ke li konscias pri si mem, estas interesiĝi pri la kulturoj, kredoj, moroj, lingvoj, ktp, de aliaj homoj. Por interesiĝi pri tiu temo tute ne necesas rezigni pri sia propra kulturo, sia propra kredo, siaj propraj kutimoj kaj sia propra nacia lingvo. Laŭ la kristana tradicio, amo al aliaj homoj estas ligita al la amo al si mem. Tion oni povas esprimi alimaniere : por esti mondĉivitano, necesas esti civitano de preciza loko en la mondo. Se ne, oni nur ŝvebas en utopiaj teorioj.

Tial, tute ne hontante, ke mi estas franca kaj kristana, mi korespondas kun homoj el aliaj nacioj kaj kun aliaj konvinkoj.



La celo de Esperanto tia, kia ĝin kreis Zamenhof, estas la interfratiĝo de la tuta homaro. Ĝojinde mi ne estas la sola infano de miaj gepatroj, ni estas 5, kun diversaj opinioj pri multaj temoj. Dum mia infanaĝo, ni kverelis, kiel ĉiuj gefratoj. Nun, kvankam ĉiu el ni opinias, ke la konvinkoj de la 4 aliaj estas plejparte eraraj, ni havas plej glatan familian vivon, kaj ĝojas, ke la infano de miaj fratoj, ricevinte diversajn edukigojn, amiku unu al la aliaj. La malplej junaj el miaj nevinoj havas inter si punkton, pri kiu ili konsentas : necesas lukti kontraŭ rasismo.

Tiu familia etoso influas al mia mondkoncepto : mi revas pri interfratiĝo de la tuta homaro, pri la "granda rondo familia". Sed mi ne kredas, ke tiu interfratiĝo povos realiĝi nur per la konformiĝo de la tuta homaro al unu modelo.
Vivu diverseco !

Ĵanseb :

CIVILIZACIAJ RAJTOJ

Se oni lasas malplimulton aparte, oni kreas "getto"-n.

Se oni integras ĝin, oni malaperigas ĝian personecon kaj minacas ĝian kulturon.

Se oni lasas ĝiajn membrojn libere elekti ĉu integradon aŭ ne, oni tamen kreas getton, ĉar tuj forfuĝas la plej fortaj, junaj, spertaj, allogaj individuoj, kiuj pli facile integriĝas, se integriĝo estas alloga. La gettoj estas nur malpli viglaj. (Vidu la francajn provincojn elsuĉitajn de Parizo.)

Aŭ kiam estas la malo, alkuras homoj, kiuj eksentas sin anoj de malplimulto, nur por profito. Sed tio mallonge daŭras, ĉar la plejmulto ne multe ŝatas tiujn privilegiojn, nek la malplimulton, kiu perdas sian spiriton.

Kion fari? Interne de iu lando, eble trovi ekvilibron, en kiu ĉiu homo okupu la lokon, kiu konvenas al li : Profit-emulo profitdonajn postenojn, honoremuloj honorigajn, intelektuloj klerajn, artistoj kreigajn, ktp...

Inter la diversaj landoj kaj civilizacioj, la problemoj ŝajnas pli malfacile solveblaj, ĉar estas ne nur diverseco pri

deziroj aŭ vivmaniero, se ankaŭ pri penso mem : Ĉu la problemoj, kiuj estas nun inter Okcidento kaj Islamo, ne fontas de nia malatento pri aliaj civilizacioj, kiujn ni riskas detrui nome de tio, kion ni Okcidentanoj nomas "homaj rajtoj" ?

Mi ne multege pripensis la temon, kaj, ĝis nun, tio estas nur hipotezo. Sed kiam oni studas la civilizaciojn, oni konstata, ke nur la nia starigas individuon antaŭ aliajn valorojn. Ĉu aliaj rajtas pensi aliel? Kompreneble, Homaj Rajtoj estas gravegaj por mi, okcidentano. Sed, se alicivilizacio respektas miajn valorojn, mi devas reciproke respekti liajn.

www.wwww.wwww.wwww

aliaj kontribuoj al tiu ĉi debato aperos en venonta L!
www.wwww.wwww.wwww.wwww.wwww.wwww.wwww.wwww.wwww

La kroniko de R.A. :

Londono, Dimanĉon la 29an de januaro.

La geedziĝo

Hieraŭ mi ĉeestis la geedziĝon de Sheila kaj Hector. Ili gastigis min tutan monaton post mia alveno en Londono, kaj iĝis de tiam bonaj geamikoj.

Lastan geedziĝan feston mi partoprenis, kiam mi aĝis ĉirkaŭ 17, antaŭ jam pli ol deko da jaroj. En tiu tempo mi malŝategis tiajn familiajn kunvenojn kun ĉiuj ties formalajoj. Devigite de la gepatroj, mi vestis kostumojn, eniris preĝejojn kaj plej ofte malĝuis la tuton. Kiam mi min emancipis de la familio, mi neniam plu partoprenis geedziĝan feston aŭ ion similan. Se amiko de mi edziĝas, estas kutime pro leĝaj kialoj, kaj neniu festo, neniu ceremonio okazas.

Hieraŭ estis pluva tago. Mi elektis miajn vestojn konforme al la vetero kaj ne al la ceremonio. Mia amikino Janet kaj mi eliris el la ĉambro jam malfrue. Ni atendadis la buson, engluigis en araba manifestacio kaj pro tiu homamaso ne povis eniri la subteran trajnon, daŭrigis piede, iom perdiĝis kaj fine atingis la preĝejon malsekaj nur por aŭdi la novelzon ripeti la ritajn frazojn ĵus dirit-

ajn de la pastoro.

Post la religia ceremonio, ĉiuj kunvenis en la suba halo de la preĝejo por manĝi, trinki senalkohole kaj babili. Post iom da tempo, ni rekonis konatajn vizaĝojn de la londona klubo kaj tiel formiĝis grupeto el la grupego. Kelkaj klubanoj demandis min, ĉu Janet interesiĝas pri Esperanto kaj ĉu ŝi intencas ĝin eklerni. Al tio, mi rebatis ke ŝi fakte havas pli da emo por eklerni la germanan ol esperanton. Ili tamen ne malkuraĝiĝis je mia negativa respondo kaj plurfoje instigis ŝin konatiĝi kun nia lingvo.

Post la manĝado okazis kelkaj paroladoj de ĉeestantoj pri la geedziĝo. Unu el la paroladoj estis en esperanto poste tradukita en la anglan. Peter, unu el la klubanoj, rilatigis Esperanton kaj la geedziĝon per anekdoto trafe elektita. Li celis, ke ĉiu el la partoprenantoj almenaŭ sciu ke la genovedzoj estas esperantistoj. Nenio notinda poste okazis krom la malapero de la Janet-mansako. Post vana serĉado, ni ekakceptis la ideon de ŝtelo. Tamen, min mirigis, ke sako estus ŝtelita en preĝejo ĉefe pro la fakto, ke ĉiuj partoprenantoj estis invititoj. Tiam mi ekpensis pri infana ludo kaj mi tuj enketis al la unua infano, kiun mi vidis. Kvinjara knabino, aŭdinte mian demandon, kondukis min al iu angulo de la preĝejo kaj ĝoje montris al mi, kie ŝi kaŝis la mansakon.

Post la restado en la preĝejo, parto de la ĉeestantoj translokiĝis al iu domo de hispana paro duonesperanta, kie eblis trinki ĉampanjon kaj manĝi diversspecajn ĉokoladojn. Samrapide kiel en la preĝeja halo, la esperanta grupo reformiĝis. Dum ni tiel babilis, la vespero fluis ĝis la forirtempo. Versajne la diskutoj malgravis, ĉar mi jam forgesis pri kio temis, krom mia diskuto kun iu sinjorino, kies edzo estis unu el la plej gravaj esperantistoj - la plej grava, laŭ ŝi - dum duonjarcento...

R.A.

~~~~~

la venonta numero  
aperos meze de majo.

## RAJTO DE MALSIMILECO

aŭ

### INTEGRADO DE LA MALPLIMULTOJ ?

(laste ricevitaj kontribuoj)

#### PAKO :

La rajto je malsimileco de la malplimulto estas evidenta, tamen la integriĝo estas, krom neevitebla, ankaŭ necesa, kaj tute kongrua kun la Homaj Rajtoj. Fakte ĝi estas la ununura racia eblo de tiu malplimulto.

Mi klarigu la ŝajne kontraŭajn asertojn, per kiuj mia skribaĵo komenciĝis :

Neniu povas pretendi, ke enmigrinto, kvazaŭ li plu estus en sianaskiĝa lando, plu sekvu sialokan vivmanieron, ĉar ĉi tiun ege determinas la grundo, la klimato kaj la geografiaj ecoj de la terparto, kie li naskiĝis. Jen ni do trovis limon al la rajto je malsimileco. Limo, kiun ni povas nomi fizika, fontanta el la apartiĝo de homo disde lia grundo.

Sed, laŭ mi, ekzistas plia limo, pri kiu ja konstante estiĝas diskutoj : temas pri la akcepto, fare de la enmigrinto, de la sociordo, en kiu li gastas. Do la enmigrinto rajtas absolute je malsimileco intelekta (kalkulo pri lingvo, politika, filozofia kaj religia kredoj, arta esprimado, informado, verkado, ktp) kaj persona (persona agado kaj konduto, sinvestado kaj, kompreneble, haŭtkoloro). La ceterajn aspektojn de lia malsimileco limigas la sociordo, kie li nove loĝas. Atentu, mi ne diras, ke malplimulto rajtas je malsimileco nur unuope kaj intelekte, sed ankaŭ grupe kaj en siaj rilatoj kun la gastiganta socio, kondiĉe, ke ĉi tiun ne perfortu tiu malsimileco.

Nu, ĉi tiun limon ni nomas integriĝo kaj, ĉar ĝi estas tro difuza, mi taksas ĝin justa aŭ maljusta depende de tio, ĉu ĝi respektas la Homajn Rajtojn aŭ ne.

Ĝis nun nur la koloniistoj pli-malpli sukcesis transpaŝi tiujn limojn : portante al la kolonioj siajn konstruaĵojn, plantojn kaj bestojn, kaj trudante sian moron al la koloniitoj. El tio rezultas grava detruo de gastiganta kulturo, kio ripetiĝu neniam kaj nenie (inkluzive de okcidento).



antojn. La loĝantoj de la kapo ne povas vivi komforte inter la piedanoj kaj reciproke ; necesas do ia adaptiĝo, kaj iuj translokiĝoj kaŭzas malaperon de la vaganto. Nia korpo estas unu, sed ĉiu parto de ĝi havas proprajn karakterizaĵojn, kaj la anoj de ĉiu parto ne libere permesas al fremduloj enveni. Ni memoru pri la lukto de kelkaj ĉeloj niakorpaj kontraŭ mikroboj ; mi povas el tio kompreni, ke diskriminacio estus ia leĝo natura aŭ kreata. Kial ftiro ne povas vivi sur kapo kaj pedikoj sur pubo ? Homa korpo estas kompleksa, tiom kompleksa, kiom la tero.

Ĉu afrikanoj povas vivi sen frostproblemo en la malvarmaj landoj ? Kial oni ĉiam aŭdas pri apartismo, militoj, ktp.? Samkiel la estuloj en la homa korpo, la teranoj ĉiam projektas sian medion. Ekzistas en ĉiu parto de la tero ĉio necesa por la tiea vivo. Ŝajne, ankaŭ la tero estus ĉelo de alia korpo, kaj tiu korpo, parto de io alia.

Kaj nun, kio pri la fino de la mondo ? Ne, la monda fino ne okazos. Antaŭ mia naskiĝo, mi estis en la sino de mia patrino. Antaŭ mia veno en la uteron de mia patrino, mi ne scias, kie mi estis. Ĉu duono de mi estis en Paĉjo kaj la alia duono en Panjo ? El kio fontas tiuj duonaĵoj ? Oni povas imagi, ke io aliĝis en ion alian, kaj tio okazis sinsekve ĝis la apero de mi sur la tero. Kio devis esti la baza aĵo ? Kie sin kaŝas la inter-aĵoj ? Ĉio mortas, ĉio malaperas por generi ion alian. Ĉu tiu transformiĝo ne estas ia leĝo natura ? Ni reiru al la ĉeloj enhomaj : ĉiu mortu, malaperu por naskigi ion alian. La vivo de tiuj ĉeloj estas malpli longa ol tiu de ilia mondo, la homa korpo. Ĉu la loĝantoj de la homkorpo scias, ke ilia mondo iam malaperos? Tamen tiu mondo, la homo mem, tion scias. El tio facilas al mi konjekti, ke ankaŭ la tero iam forpasos. Komprenindas, ke la vivdaŭro de la tero estu pli longa ol tiu de la homoj. Certe, kiel la ĉeloj kaj la homoj, ankaŭ nia tero kaj eble ĝiaj samaĵoj kaj mondo iam malaperos. Tiu malapero estas nur ŝajna, ĉar la konsistigaĵoj de la malaperanta korpo aliĝas por vivigi ion alian. Kian mesaĝon la ekstaziga rivero alportis al mi? Tion mi diru :

Ĉio estas senfina, ĉio estas infinito en infinito, ĉio estas parto de io alia, nenio mortas, sed ĉio transformiĝas.



# laŭtaj informoj

## LETERO :

Estimata!

Mi nomiĝas Elżbieta Kembłowska, 30-jara, virino, oficistino (informadikistino). Bonvolu trovi por mi korespondanton. Mi deziras korespondi por ekzerci la lingvouzon kaj profundigi la lingvokonon. Mi interesiĝas pri literaturo, muziko, E-movado kaj turismo.

Generale mia hobia estas : \* kolektado de libroj kaj sondiskoj \* legado de bonaj libroj \* korespondado en Esperanto.

Bonvolu transdoni mian adreson al persono, kiu volas korespondi kun polino :

Elżbieta Kembłowska, ul. Aleksandrowska 16 m 56  
PL 91-ŁÓDŹ, Pollando.

\*\*\*\*\*

## REGIONA ESPERANTO-RENKONTIĜO

La Kongreso de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono de la Kulturaj Centroj por Esperanto" okazos la 15-an kaj la 16-an de aprilo 1989 en Lézignan-Corbières. La laboraj kaj distraj kunvenoj okazos en la "Maison des Jeunes et de la Culture" Rue Marat, 11200 LEZIGNAN CORBIERES.

Ebleco loĝi kaj manĝi je moderaj prezoj surloke.

Informojn sendas : Kultura Centro de la Orientaj Pireneoj, 72 av. du Gén. de Gaulle, F 66000 PERPIGNAN. Tel: 68 34 22 18 aŭ 68 55 51 77 dum la tagmanĝo.

\*\*\*\*\*

## ESPERANTO EN MINITEL

Nova kodo : Post la malapero de la antaŭaj informoj la Kultura Centro en Perpignan sukcesis enirigi en Minitel novajn informojn inter kiuj estas la listo de ĉiuj francaj federacioj kun adresoj de la sekretarioj : 36.15 INDEP Rúbriko G.

\*\*\*\*\*

**KORESPONDPETO** : Kiuj deziras korespondi kun E-lernantoj en Sovetio, tiuj notu jenan adreson : Nicolas FOTUL, Str. Gorkij 84, VINOGRADOV, U.S.S.R.

## KREI PONTON INTER OKCIDENTO KAJ ORIENTO !

Amiko el miaj, en Nîmes organizas preskaŭ ĉiujare vojaĝon en orient-eŭropajn landojn : Pollandon, Hungarion, Bulgarion, ktp. Mi jam partoprenis multajn kaj multe ĝojis pri tiuj okazoj malkovri malproksimajn kaj ne tre facilajn landojn kiel celojn de vojaĝo! Mi proponis jam krei ĉenon pri informado pri tiutipaj agadoj, por permesi disdoni informojn : ĉar ni kelkfoje devis nuligi la vojaĝon, ĉar ni ne estis sufiĉa multnombraj. Tamen tiuj vojaĝoj estas tre malmulte kostaj : la prezo meza estas de 200 ĝis 250 FF por ĉiu tago, inklude vojaĝon, tuttagajn ekskursojn, hotelon kaj manĝojn! Certe, ĉar la usontipaj hoteloj por kapitalistaj turistoj kostas 1000 FF por unu persono sen manĝo, vi povas certe vojaĝi laŭ plialtaj prezoj, se vi deziras! La proponita prezò estas preskaŭ kiel por ĉeesto en Grésillon (sen vojaĝo), tamen Grésillon estas ne trekosta.

Kial ni povas proponi tiom malmulte kostajn vojaĝojn? Ĉar la organizanto ne prenas profiton unue, kaj due ĉar li en tiuj landoj havas korespondantojn, kiuj preparas la vojaĝojn, elektas la hotelojn, la restoraciojn, la samideanojn, kiuj akceptos nin kaj kondukos nin tra la urboj, ktp.

Se en malproksimaj regionoj amikoj deziras organizi tiutipajn vojaĝojn - ĉar se vi loĝas en Sudokcidenta Eŭropo de 200 ĝis 300 km. for de Nîmes, mi pensas, ke pli facile estus, partopreni la organizaĵon de nia grupo - mi donas ĉi-sube la adreson de bulgaraj samideanoj, kiuj povus organizi por vi akcepton kaj pilotadon en sia lando :

Hristo kaj Ceco Ivanov Filipov  
Ulica Mir n.20a  
BG PLEVEN-5800 BULGARIO

Tiuj amikoj deziras ankoraŭ organizi vizitojn de folkloraj grupoj, interŝanĝon de studentoj, inter orientaj landoj kaj okcidentaj, ili povas konduki vin per via buso, de limo ĝis landlimo, aŭ luigi por vi buson en Bulgario...

Mi esperas, ke ili donos siajn informojn tre rapide en venonta numero de **Laŭte**, aŭ se vi estas interesata, vi povas tuj skribi al ili.

Se vi estas interesataj pri la vojaĝoj organizitaj el Nîmes, vi povas skribi al :

J. MASSON  
162, rte d'Uzes, F 30000 NIMES  
tel: 66 26 78 54

Ne forgesu respondpoŝtmarkon, mi petas.

**Paŭlo.**

## INTERNACIA BIKIKLADO POR MILITRIFUZO

En Majo 1988 kuniĝis konsciencobjetantoj germanaj, belgaj kaj francaj por naski projekton rilate bicikladon, kies ĉefa temo estos militrifuzo.

Inter Bonn la 28an de Aprilo, kaj Strasbourg, la 16an de Majo, tiu biciklado renkontos pacmovadojn en 10 eŭropaj urboj, kiuj okazigos manifestaciojn pri diversaj temoj kiel mediprotektado, alternativoj al militdefendo, eŭropaj kulturoj...

Por fortigi internaciajn ligojn, ni interkonsentis kiujn kondiĉojn la statuto de konsciencobjetanto kaj alternativaj servoj devontus plenumi. La rezultanta verko estos subskribita de la plej multnombraj movadoj, kaj donata al okcidenteŭropaj instancoj en Strasbourg. Tiu komuna referenco ebligos novajn solidarecojn preter landlimoj.

Samspirite, la tradicia tago de konsciencobjetado - 15an de Majo - estas ĉi-jare dediĉita al Sudafrikaj militrifuzantoj. Ni informados survoje pri kiaj punoj ili suferas malservante la registaron. Fakte, tiu lando reeligas la danĝeron de armeo, uzata por perforte subteni politikon, kiu tute malrespektas bazajn homajn rajtojn.

Jam multaj pacmovadoj pretas kunlabori. Ni esperas tutmondajn partoprenantojn - ni povas finance helpi individuojn el ne-transpagipovaj landoj.

Por pliaj detaloj aŭ aliĝoj, kontaktu :

Service Civil International  
Eurotour 89

129, rue du Fg. Poissonnière, F 75009 PARIS

### Itinero :

Bonn, 28/4 - Köln, 1.2/5 - Maastricht, 4.5/5 - Liège, 6/5 - Bastogne, 8/5 - Luxembourg, 9.10/5 - Verdun, 11/5 - Nancy, 12/5 - Strasbourg, 15.16/5.

\*\*\*\*\*

## ALVOKO AL ESPERANTISTOJ BIKIKLEMULOJ

Vi jam legis en **Laŭte** pri B.E.M.I., al kiu mi mem aliĝas.

Nun mi volas informi pri ne-esperantista biciklado, kiu tamen povas interesi multajn kaj povas esti bona okazo por propagandi Esperanton.

Kvankam BEMI planis bicikladon en 1989, la alia ne estas konkurenco, ĉar povas interesi biciklemulojn, kiuj ial ne povas partopreni la BEMI-organizaĵojn sed estas disponeblaj por alia pro datoj, lokoj, ktp.

Nu, temas pri REVIA (Route d'Europe à vélo pour imaginer l'avenir = Traeŭropa biciklado por imagi la estontecon), kiu volas atentigi pri

homaj rajtoj. La celo de la bicikladoj estas "Strasburgo", sidejo de la Eŭropa Parlamento.

Kvar karavanoj foriros el Cork (Irlando), Helsinki, Ateno kaj Lisbono cele al Strasburgo.

Mi mem intencas partopreni ĉi-lastan ekde Montpellier ĝis Strasburgo. Ĝi foriros de Lisbono la 24an de julio, trapasos Montpellieron la 15an de Aŭgusto kaj alvenos en Strasburgo la 1an de Septembro.

La taĝetapoj estas ĝenerale mallongaj. La plej longaj (100 km. aŭ pli) estas verŝajne sur ebenaĵoj aŭ malsupreniradoj, ekz. Mont-Louis - Carcassonne : 120 km. Aliaj estas ege mallongaj, ekz.: Vienne - Lyon : 30 km, kaj estas multaj ripoztagoj.

La alveno en ĉiuj urboj estas planita por la 18a ĝis 18a horo kaj 30.

Por informoj la adresoj estas :

REVIA - A. Robart, 1 rue Leneuve, 75014 PARIS

REVIA - K. Probert, 29 Regina Point, Canada Estate, Rothehithe, LONDON 3E 16UK

REVIA - J. Carlos x Cauno Garcia, rua do Sto Antonio da Glora n°55 1200 LISBOA, Portugal

REVIA - EICHOLZ, Wiemerstr.8, D-5620 LANGENSBERG

Mi opinias, ke por esperantistoj partopreni estas bona okazo informi pri Esperanto kiel solvo por la eŭropa lingva problemoj kaj des pli bone se estus en diversaj karavanoj kelkaj diverslandaj, kiuj povos montri je la kuniĝo en Strasburgo la praktikan valoron de nia lingvo.

Lucien ANGEVIN

Rue Bernard Lazare, F 30740 LE CAILAR

\*\*\*\*\*

Marian ZDANKOWSKI  
Pana Tadeusza 15 m 69  
PL 10-461 OLSZTYN  
Polska - Pollano  
tel. 33-47-60

Mi invitas kontakti min pri eventuala vizito al mia urbo, al mia loĝejo... Mi interesigās pri reciproka gastigado.

## MAZDAĴETOJ


*Esenca diferenco*

*Inter komunismo kaj socialismo - a b i s m o !*

*Ĉu estas bone?*

*En la mazdaĵetoj normala mozaiko, kiel en la vivo - sekso kaj politiko.*

Amika Esperanto-Rondo (Cercle espérantiste de l'Agenais, F - 47340 Laroque) proponas al vi :



## RENKONTIĜI ALIMANIERE

Ĉu ankaŭ vi sentas la bezonon kaj la emon renkontiĝi kun Esperantistoj, sed ne nur okaze de kursoj, seminarioj aŭ kongresoj : simple por kunsperti amikan, ĉiutagan kunvivadon en internacia etoso, proksime al la naturo, sen grandaj elspezoj ?

Se jes, eble logos vin la Muelejo de BEAUVILLE (Moulin de BEAUVILLE), tiu akceptema, kampara bieno, afable disponigata de Solanĝa kaj Kribo, kaj kiu aldone al siaj naturaj trezoroj (la suno, la rivereto, la vastaj kampoj kun prunarboj...), ekipiĝas por akcepti grupon : kuirejo, necesejo, lavejo, salono, ĉambroj...

La materialaj kondiĉoj do ekzistas por ebligi simplan renkontiĝon : **sufiĉas nun efektiviĝi ĝin.**

**Kiel ĝi povas organiziĝi ?**

La partoprenantoj simple kunvivos, dividante kaj la elspezojn (nutraĵon, gason, elektron...) kaj la diversajn taskojn (kuiradon, purigadon...)

La programo estos kune decidata laŭ ĉies proponoj. La eblaj aktivecoj estas multnombraj :

- \* debatoj, ludoj, kantoj, teatraĵoj, E-kursoj... (aldone al la kompreneble ĉiŭmomenta uzado de Esperanto)
- \* ankaŭ eblos gimnastiki, jogi, naĝi, ekskursi bicikle aŭ piede, botanikumi, ĝardeni, ktp, ktp.



\* kaj kial ne kunlabori en la muelejo aŭ en la ĝardeno por plibonigi kaj plibeligi la renkontiĝejon ? aŭ helpi en la eldonado de la gazeto **Laŭte!** aŭ de diversaj broŝuroj ?

Konkretaj informoj :

### Kiel atingi la Muelejon ?

**BEAUVILLE** estas vilaĝeto 500-homa, 25 kilometrojn nordoriente de **AGEN**, en sudokcidenta parto de Francio. La Muelejo situas ĉe rivereto "Séoune", je la norda mal-supro de la vilaĝo, rande de la vojo al Montaigu de Quercy. Panelo : "Carque Sac".

**Aŭtomobile** : De Agen, uzu la vojon D 656 ĝis loko "Les Tricheries", Unu kilometron poste, turniĝu dekstren al Beauville. Kiam vi ekvidas Beauville sur la monteto, restu en la valo, kaj daŭrigu 800 metrojn sur la vojeto al Montaigu de Quercy. Maldekstre vi trovos "Carque Sac". Jen vi alvenis!

**Trajne** : Plej proksima stacieto : **LAROQUE** (15 kilometrojn proksime de **AGEN** sur linio Paris-Périgueux-Agen. Kiuj venas de **BORDEAUX** aŭ **TOULOUSE**, tiuj povas ŝanĝi trajnon en **AGEN**, uzante la linion direkte al Monsempron-Libos. Se vi deziras ricevi taŭgan trajn-horaron, kaj ke ni aranĝu vian veturadon de la stacidomo de **LAROQUE** aŭ **AGEN** al **BEAUVILLE**, skribu al ni. Notu la utilajn telefon-numerojn :


Loĝejo de Solanĝa Kaj Kristiano **BAUDE** (Gare SNCF, en F-47340 **LAROQUE TIMBAUT**) : 53 95 75 03.

Moulin de **BEAUVILLE** ("Carque Sac", F-47470 **BEAUVILLE**) 53 95 40 26.

Datoj por la renkontiĝoj :

\* De la 29a de aprilo ĝis la 8a de majo (ni ankaŭ preparos la julian restadon)

\* De la 10a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1989 (sub la ĝenerala ŝildo "Ekologio kaj Esperanto", kun partopreno de amikoj de Mondhejmo, amikoj de **Laŭte!**, de la Amik-eca Reto de SAT, ktp...



### Aliĝilo

resendota al

Cercle espérantiste de l'Agenais  
F - 47340 **LAROQUE TIMBAUT**

Mia adreso :

Mi deziras partopreni renkontiĝon en "Moulin de Beauville"

**Datoj** : Mi havas dormsakon/tendon/ruldomon

Mi alvenos trajne/aŭte/.... Tago kaj horo :  
Mi deziras ricevi trajnhoraron por esti en Agen/Laroque matene/posttagmeze/vespere de jena tago :

Mi interesiĝas pri / Povos helpi por / Prezenti / Kom-  
tentas pri / Kunportos biciklon jes/ne / ktp, ktp.  
(Plenigu la dorson de la aliĝilo!)

Kiamaniere esti feliĉa sen Amo ?  
Kaj ĉu eblas ne esti, kiam oni amas ?  
Iu diris :

"Ne necesas ĉiuj aĝoj por starigi mondon ;  
sufiĉas nur la cemento de l'Amo".

Kapreolino amas sian idon  
Flor amas sian sunradion  
Arbo ŝatas la aerflueton  
Kaj venteto karesas la arbon  
Dancisto amas sian dancadon  
Kaj per ĝi ricevas feliĉon  
Kantisto amas sian kantadon  
Kaj pere de ĝi li feliĉas  
Strando ŝatas siajn ondojn  
Kaj maro karesas sian sablobordon

Kiu poeto diris :

"La kantanta maro  
ĉe la marbordo  
ĉesigos sign eternan murmuron  
Antaŭ ol mia koro  
Kara amatino, ho Nella\*  
Ne plu floros cia figuro."

\*  
\* \*

A M O

Necesa Potenco  
Naskas Mondojn

Renato G.

\* Melodio de Gabriel FAURÉ.

\*\*\*\*\*

**DONACOJ REGISTRITAJ POR EKIPĪ LA RENKONTIĜ-  
EJON "Moulin de Beauville" :**

C.S. 2000 - J.L. 500 - C.S. 2000 - BdW. 80 - P.S. 1000  
G.L. 400 - J.L. 500 - C.S. 600 - D.C. 1000 - SAT 1000  
J.L. 500 - Sume (89.03.15) : 9580. FF

Ni projektas uzi la monon unue por dorm-materialo  
(litoj, matracoj, litkovriloj...) kaj kuir-materialo (kase-  
roloj...). Kribo.

Jen plia E-revuo ! Jes, sed tiu ĉi respondas bezonon sent-  
eblan ne nur en departemento 95 de Francio, sed en mul-  
taj aliaj regionoj. Temas pri dulingva (la esperanta teksto  
sidas vidalvide al la franca), komputere zorge preparita  
gazeto plena je informoj, ludoj kaj dokumentoj. Ĝiaj as-  
pekto, enhavo kaj amplekso ebligas prezenti ĝin senhezite  
al scivolaj neesperantistoj, des pli ke en ĝia mezo troviĝas  
etformate faldebla gramatiko de esp-o, vere trafe kompil-  
ita. Ĝi anoncas sin trimonata. Gratulojn kaj sukceson al  
la iniciatinto, nia laŭtulo "Sfinksido" !

La jarabono estas 6 ekuoj (7 ekuoj ekster Eŭropa Kom.).  
La poŝtkonto estas : La Source 35 766 17 T, nome de :  
ESPERANTO-95, 8 rue de l'Eglise, F 95520 OSNY.

**NI RICEVIS :**

**La letero de l'Akademio de Esperanto** : (5 rue Léon Cogniet,  
F-75017 PARIS - Jara abono : 120 FF al pĉk 735 27 B Paris). En la  
numeroj 5 kaj 6 abundas interesaĵoj. La Akademio klarigas la adopton  
de la landnomoj Koreo/Egipto. A.A. sugestas por la monatomoj la raci-  
ajn unembro, duembro... ĝis dekduembro, kaj por la tagoj : undo, dudo...  
ĝis sepdo. Fantazio do ne mankas. Alia celo de ĉiuspecaj perfektigem-  
uloj : la nomoj de alfabetaj literoj. La praa abocoĉodo ŝajne ne plu  
sufiĉas... En la n-ro 6 : la unua parto de artikolo pri la roloj de la  
Akademio kaj 2 longaj paĝoj de la neevitebla B. Golden pri "sgrafito",  
kiun li malkonsilas, profite al "grafitio".

**La Migranto** (organo de la Esp. Naturamikoj) aperigas en  
sia marta numero plurajn interesajn, ilustritajn artikolojn.  
Notinde, ke la ĉi-jaran SAT-kongreson (en Illertissen, Bavario) sekvas  
internacia semajno en la Naturamika Domo en BODMAN, apud la lago de  
Konstanco. La aliĝo : 100 gmk al Lothar ECKERT, Im Kirchspitzen 4,  
D-7552 Durmersheim, pĉk : 125345-755 Karlsruhe. La restado kostos 468  
gdm (NA-membroj) aŭ 498 gdm (ne-membroj). Abono al **La migranto** :  
9 svisaj frankoj al la pĉk : 80-2128-2, Gen.Zentralbank, CH-8001  
Zürich.

**Proksime de ni : AVENO !** Agrable surprizas la 5a n-ro de  
AVENO, anoncanta sian denunan regulan aperadon pri politika ekologio.  
Ĝis nun mankis kontribuoj de verduloj e-istaj, sed la redaktoro, C. Fettes,  
vetas pri vekigo de verkemuloj. Li estu aŭdata!  
La Kunordigo de la Verduloj decidis okazigon de sia venonta kongreso

en Parizo de la 21a ĝis la 23a de Aprilo '89. Jen bona okazo por la verdulaj e-istoj provi la taŭgecon de esp-o, samtempe analizante la relativan sukceŝon de la germanaj kaj francaj verduloj okaze de freŝdataj balotoj. En tiu n-ro legindas ankaŭ la unua parto de artikolo pri "La verdula Movado en Finnlando". Kuraĝigu la prizorgantojn de AVENO, ambaŭ laŭtuloj, vivigante la ĝis nun tro modestan bultenon de A.V.E.!

Adreso de la sekretario : J.C. THUMERELLE, rue Pierre de Simpel 10, B-7790 WARNETON.

## ESPERANTO-KLUBO ĈIUTAGE FUNKCIANTA !

Ĉu tion vi povas imagi ? Tamen tio ekzistas : la klubo "Esperejo" en Budapeŝto malfermiĝas ĉiutage de la 17a ĝis la 21a horo. Foje estas prelegoj, kaj ĉiam oni povas babili kun esperantistoj. Eblas akiri trinkaĵojn kaj sandviĉojn. Krome, la klubejo situas tute proksime de stacidomo Keleti (orienta), kie alvenas multaj trajnoj el diversaj landoj. Nura problemo : la danubaj krokodiloj. Sed eble temas pri drakoj, ĉar ili fumas... Se tio ne senkuraĝigas vin, alkuru al :

Klubo Esperejo, Strato Peterfy Sandor n°23, BUDAPEŝTO.

== Reencikligo de diversaj materialoj en la Laŭtejo ==

1) **La papero** : Tiu ĉi n-ro (escepte de la kovrilpaĝoj kaj p.47/50) estas presita sur rekuperita, 100-procente "reencikligita" papero germandevena (vd. la markon p.58)

2) **La paperulo** : La estraro de SNCF, kiu ĝis nun komplete lasis eldonadi E-aĵojn eĉ dum la deĵorhoroj de sia oficisto en Laroque, decidis abrupte reencikligi lin ekde marto en alian stacion (PENNE), kie, ho ve, nur fervojumi eblas. Rezultas por la koncernato multe malpli da libertempo dediĉebla al sia hobbio. Li tial petas indulgon de la geamikoj, se de nun ne ĉiam eblos respondi akurate, kaj se ne ĉiuj projektitaj eldonadoj povos ĉi-jare okazi. Sed la reencikligito strebos plu regule eldoni la gazeton **L!**, eĉ 6-numere se eblos. Paciencon do havu la multaj artikol-sendintoj. Ilia propra materialo aperos en venontaj n-roj.

**N.B.** - Ĉar ne okazis transloĝiĝo, plu validas la adreso en Laroque-Timbaut.

Amikajn kisojn al geĉiuj,  
Kribo.

=====

Sibila mesaĝo : la falantaj simioj ne rilatas al la afero...